many new friends I could gain because the more friends I had, the more important I felt. ²But now when I think about that, many years later, and in a distant land without friends, ³it seems that friendship is a temporary affair. ⁴I remember that my best friend, whom I'd known almost twenty years, married and bore a son in the span of a year. ⁵After that, we grew apart from one another because our lives separated according to different paths. ⁶It is for that reason that the beliefs of the Sibiano please me because their speeches clarify and help rule the life. ⁷By it, I know the time when I became an adult, when I must marry, and what to expect after death. ⁸There exist then no concerns about what one must do because everything is already written.

Thursday 18th – Saturday 20th of May

¹Someone dedicated many pages to the idea of love; thus, I named this part of the book the love area. ²Also, I've noticed that the main speaker in this part is Esuo, whose speeches have begun to please me more and more. ³Here's one of his speeches, the fifty-second: ⁴"There exists no perfect person, who is for you and you for him; that type of person simply doesn't exist. ⁵Thus, we must choose according to suitability, not perfectness, because a perfect person you will not find, but a suitable person we already have. ⁶So when the time comes to become one flesh, you must stop the chasing ⁷because like the dog with

the branch who desires the tree, thus you will desire the more beautiful. ⁸Thus, if you are not content, you will not be happy. ⁹This is why I created the requirement of knowing before you have the right to become one flesh. ¹⁰Search out then someone who can satisfy your carnal desires, can link themselves to you spiritually, and can support you in those moments of need. ¹¹For those of you who cannot imagine such a person, think of your dog and his love for you. ¹²Perhaps he is not the most beautiful or strongest dog, but he is yours, and he loves you.”

Sunday 21st – Monday 22nd of May

¹Today, I continued to search for new speeches, when I uncovered the following speech of Esuo. ²This speech strangely doesn't relate to love but to the dissemination of the religion. ³This is it, the fifty-fourth speech of Esuo: ⁴“A spirit speaker asked me about the requirement that we should teach the truth of the Gods to all whom are ready to hear it. ⁵This means according to me that we above all need to faithfully hold our beliefs and fulfill the requirements because why would one believe in us and desire the truth of the Gods if we wouldn't believe in that? ⁶So be strong and happy, but neither loud nor silent, because the Gods always need more believers. ⁷So if you desire to spread the true religion, then present it to your listeners in a suitable manner, aiming at their requirements ⁸because our religion covers all sides

of life and can give happiness to the most unhappy. ⁹Tell them the story of the Gods, present the requirements, and speak the speeches of our most wise spirit speakers. ¹⁰If you are certain that the religion will better their lives, then give them the gifts of our religion ¹¹because they will never forget your good doings.” ¹²Now I understand the wisdom of Slatino and why he gave me this book.

Tuesday 23rd – Wednesday 24th of May

¹This is the fifty-fourth speech of Ostuo, which talks about the danger of the Eastern worshippers. ²I suppose that they are the described people of the north: ³“They occupy our lands, take our sisters, and forbid our sacred religion. ⁴My heart calls on the Gods for justice because I remember the time when we could freely walk through the village of Seroto, ⁵and now our most courageous war players can’t enter. ⁶Eastern worshippers, readers of the cursed book, attack the flanks of our sacred land ⁷like birds on the back of a dying beast. They attack; thus I order in recompense that we attack before their feathered mouths and bird fingers suffocate us. ⁸Thus, attack for our children, for our religion, for our future. ⁹Confront the praisers of Sireo! Drive them from our lands and re-establish our sacred schools ¹⁰because silence will lead us to death.

Thursday 25th of May

¹I found a speech of Carjata, which is so similar to my own beliefs that I can't imagine a better speech. ²This is the thirty-fourth speech: "I passed three years in teaching the truth of the Gods. ³The biggest difficulty, which I encountered while teaching new converts about the speeches of Vajeso, ⁴is that our language is too difficult to master. ⁵This is why I recommend to the Paalo before me that we should find or create an easier and mixed language so that people from all origins can equally learn our sacred beliefs." ⁶Perhaps I can create a new language, which will use Esperanto and the Kontombile names.

Friday 26th – Saturday 27th of May

Unwritten Entry.

Sunday 28th – Monday 29th of May

¹If someone showed a pastor the following speech, he would immediately suffer a heart attack. ²This is the fifty-third speech of Esuo: ³"It is forbidden to you to fulfill the ritual of chasing if you still are a virgin. ⁴Because this ritual requires that you know the flesh of your lover before you're permitted to become one flesh. ⁵Because the pleasures of the skin are the only joyful pain that the Gods have given to us, ⁶thus it's a great crime to refuse these pleasures. ⁷So let it be known to all that between the age of maturity until

three hundred moons, every man and woman must know no less than three other people.”

Tuesday 30th of May

¹Next Sunday I intend to begin the ritual of chasing against Marianne. ²So today I searched out a location where pink flowers grow because I heard that she loves the pink color.

Wednesday 31st of May

¹Who would've believed that finding pink flowers would be so difficult? ²I have already found white, red, yellow, and many others, but pink flowers I still can't find. ³However I'm thinking that I won't begin the ritual of chasing against her because I still don't possess a house. ⁴Sometime after dinner, I began to learn about the differences between English and American laws. ⁵I've noticed that the differences are so numbered that I don't have the ability to count them. ⁶So I suppose that the time has arrived to find new work, but it's not important because truly I've never wanted to be a lawyer.

June

Thursday 1st of June

Unwritten Entry.

Friday 2nd of June

¹Two nights ago, the Kontombilo visited me again and gave the most terrible order. ²They said that my fate is to die in less than six months. ³Because the Gods chose me as their witness and soon will place their knowledge painfully into my head. ⁴I need to write down their orders to be a testament about the truth of the Gods. ⁵They said that people from everywhere will read my diary, and through it, they will learn about the truth of the Gods. ⁶Then the Kontombilo said that to stand against the Gods is impossible, and if I disobey them, then my soul will return to destruction in the Paalo of the Gods. ⁷However, if I fulfill their order well, then I'll find happiness in the next life. ⁸What lies they speak. I totally don't believe them. ⁹I simply dreamt it because truly I can't be certain about what I saw. ¹⁰I'm very healthy—what lies! I'm extremely healthy.

Saturday 3rd of June

Unwritten Entry.

Sunday 4th of June

¹I was in the bathroom cleaning clothes when I swear that I felt a ghostly person speak next me. ²But having turned to where it came from, I saw nothing. ³Then, out of nowhere, a great pain hit and knocked me down. ⁴After a short time, I awoke on the floor ... and even now I'm not certain about what happened to me ... ⁵Perhaps I heard the voice of Nutaso, but that is impossible because when I tried to talk to her afterwards, no one responded to me. ⁶Truly, her silence caused me a lot of unease. ⁷I requested that she guard me from the other Gods, but she continued to remain silent.

Monday 5th of June

¹A great headache hit me about dinner time. ²Also, Luke has noticed my changed state and constantly questions me about what happened. ³I think that soon I must move because apparently he can't leave me in peace. ⁴Does he truly need to place his nose in all my affairs? Really?

Tuesday 6th – Wednesday 7th of June

¹I awoke from the presence of someone in my room. ²I can hear ... a voice just started to speak in my ears, my God— ³It should be known to all that the Gods require above all your fidelity. ⁴But don't confuse love, fear, or prayer with fidelity because we don't require your love, fear, or prayer. ⁵We require only your constant fidelity, respect,

and most importantly your progress. ⁶Thus we present to you all the requirements to make your progress according to the good path because that's what we require. ⁷If you fail to fulfill our requirements, or totally refuse us, then we will drive out your useless soul at the day of calculation. ⁸So let it be known that we watch your reading eyes—⁹yes you, reader, the following we have for you. Before you close this book, or laugh loudly, think carefully, because from now, we will judge you according to our rules—¹⁰My God, the voices have finally stopped. What has happened to me? Both my arms are shaking, and my forehead is sweating excessively. ¹¹I'm reading that which I have written. ¹²Did I really write that? My head is killing me.

Thursday 8th of June

¹This morning, the voices again entered my ears and repeated for two hours until I finally wrote what they said: ²“It should be known to all that every word out of the mouths of the spirit speakers Vajeso, Carjata, Ostuo, and the knowledge eater Esuo reflect our sacred orders. ³Thus, you must respect their speeches as our own, except if the speeches given stand against our requirements because even those saints can speak errors.”

Friday 9th of June

¹The entire day I felt sick, but the voices didn't leave me alone until I wrote that which they said. ²However, even then the voices didn't stop until I found and corrected an error in my transcription: ³"It should be known to all war players that they must master the sword, because the better they rule the sword, the better they will rule their strength, speed, precision, courage, and fear. ⁴Truly, we the Gods don't care about those war players who are capable to lift the heaviest weight, run the longest, or drink the most; ⁵we honour those war players who can rule the sword."

Saturday 10th of June

¹This morning, I prayed to Nutaso that she free me from their godly plans. ²But she didn't respond to my requests; after that, the voices began again. ³I felt that the following speech was for me: ⁴"To fear death is to fear the night, because as certain as the sun will rise again, the believers will be reborn ⁵because the time and location of your death was already decided before you were even born. ⁶The only thing that you can choose is to pass your life according to our requirements and write our testament. ⁷But do not tempt us with evil acts because even we can become impatient and therefore cut off your vrilo." ⁸The Gods speak about cutting off my vrilo while indeed cutting it off!

Sunday 11th – Monday 12th of June

¹It should be known to all that there exist three sacred punishments: expulsion, death of the body, and death of the soul. ²If the People's Paalo expel you, then you will be thrown out of your village and must travel to a location empty of believers. ³There you have two ways to redeem your honor. ⁴You can stay there during the rest of your life or convert the entire village to our sacred religion. ⁵Only if you convert all unbelievers will you be permitted to return to your village. ⁶If all villages are full of believers, then you must live alone the rest of your life. ⁷If the People's Paalo punish you to death, then you will receive twelve moons to present your innocence. ⁸If you're proven innocent, the People's Paalo will free you immediately; however, if you fail to show your innocence, then the People's Paalo will publicly execute you. ⁹If the People's Paalo punish you to death of the body and soul, you will again receive twelve moons to show your innocence. ¹⁰After that much time, the People's Paalo will execute you, and when your soul returns to the Paalo of the Gods, ¹¹we, the Gods will eternalize your memory and place your soul in the bodies of a thousand crawling things so that you may live a thousand lives full of unhappiness; then, we will cause your soul to perish. ¹²If the People's Paalo execute you without the possibility of proving your innocence, ¹³then the Gods will guard your

soul and cause the souls of your executers to perish.”

Tuesday 13th of June

¹I had a headache the entire day. ²Truly I'm not certain how much longer I can survive like this.

³My life has become impaired.

Wednesday 14th – Thursday 15th of June

¹The voices have begun to speak: “It should be known to all that the best way to fortify our religion is by your children. ²Thus, your heart will become strong while disciplining your children because the more they rule over you, the more they will disrespect you. ³So if your children don't fulfill your orders, you will do the following.

⁴Firstly, you will make them fear your words.

⁵Secondly, you will take away their privileges.

⁶Thirdly, you will make them fear by the stick, and finally, you will hit their backsides with the stick.

⁷However, it is totally forbidden to you to hit other body parts or to wound. ⁸Your intension is to teach them the good path; ⁹however, if dirty words leave their mouth, then you will immediately hit their backside with the stick because dirty words come from Sireo. ¹⁰However, you should be careful, because frequent hitting leads to hate.”

Friday 16th of June

¹“It should be known to all that you all must reestablish the People’s and Ruling Paalo, ²because without these bodies, the Sibiano will remain eternally broken and without progress. ³Also, you all will establish the Sacred Paalo of Generations, which will be the earthly throne of the Gods. ⁴Every Sibiano will carry with them a diary, which he will send to the Sacred Paalo of Generations every twelve moons ⁵to be a memorial of him, to remain eternal with us. ⁶Only the most sacred spirit speakers, the possessors of the sacred diary, will be permitted to move in the Sacred Paalo of Generations, ⁷but any believer has the right to request knowledge of those having died.”

Saturday 17th of June

¹The Gods ordered me to leave Sale and march north westerly until new orders came to me, ²because according to them, city life takes too much of my time; thus, I must move to the distant mountains. ³They didn’t say how I’ll survive there. ⁴So I suppose that I must believe in their goodness. ⁵I hope that my death will not be too painful or because of starvation.

Sunday 18th of June

¹The sun has begun to rise. I need to find a better location to rest ²because I’ve already walked almost eight hours, and now I’m very tired.

Monday 19th of June

¹I walked the entire day. While drinking out of a river, I witnessed the strangest affair. ²A kangaroo died directly in front of me; I was standing there, thinking about how hungry I was, when suddenly a branch fell on it from above. ³Now I'm sitting in a wet cave next to a river, burning the meat from the kangaroo, which is very difficult to cook. ⁴The voices began again: "You will remain here, and here you will write our knowledge until the end."

Tuesday 20th – Wednesday 21st of June

¹I awoke just before sunrise because of the loud knocking of rain against stone. ²Then I found at the mouth of the cave a leaf with fish and nuts. ³I didn't recognize those types of nuts, but I was so hungry that I ate them without care. ⁴Perhaps the Gods have decided to provide food for me. The voices began sometime after midday; in that moment, I was away from my diary, ⁵so I needed to write their voices in a notebook, and now (I) need to transcribe it here: ⁶"In life, there exist nine periods; the human race is at the third period of its development. ⁷The first period was fulfilled when the lesser Gods sowed the universe with new life. ⁸The second period was fulfilled when the human race became the most superior and capable animal of his world. ⁹The third period is yet to be fulfilled. ¹⁰You the human race must enter the universe and uncover its secrets. ¹¹The

fourth period will begin when the human race for the first time meets the other beasts of this universe. ¹²Then a great war will begin, out of which several beasts will rise themselves to become lesser Gods. ¹³But the human race will need to survive war and peace before they reach Godhood. ¹⁴The final aim of all beasts is to become Gods and thus survive the final renewal.”

Thursday 22nd of June

¹Last night I dreamt about two great ships traveling in the black sky; both were without funnels and sails, and both carried the number twelve on their side, ²but the number on the biggest was reversed. ³When the two ships passed one another, great guns appeared from inside the ships and began to shoot through one another. ⁴After apparently a few seconds, one ship exploded but made no sound. ⁵In that moment, I awoke to fish and fruits at the entrance. ⁶Some unknown person without doubt is looking after me. I don't know why he is helping me, but I want to thank him. ⁷Also, it seems that the Gods want to give me one free day because my stomach feels better.

Friday 23rd – Saturday 24th of June

¹If I hadn't brought my diary, I would have already forgotten the day. ²During the last week, I've become very thin, whether because of the sickness or my changed eating habits, I don't

know. ³And I'm starting to doubt everything that I've felt, seen, and heard. ⁴Did I simply imagine it all, the Kontombilo and everything else? Did the Blackman even exist? Did I also imagine him? What is happening to me? ⁵"Long after your death, a man not of your blood, but of your soul will inherit your diary. He will give it to the reading world. At first, people will attack our new believers publicly, but soon our believers will be forgotten. ⁷However, in the years following, a great war will capture the world, led by the Eastern worshippers, who will use deception and lies to gain superiority. ⁸They will take the hearts of your still unborn children and will turn them against you. ⁹It will be during that time that the human race will return to the truth of the Gods and will call on us for help. ¹⁰And when everything seems lost, a new generation of war players, knowledge eaters, supporters, and spirit speakers will stand and fight against the Eastern worshippers. ¹¹However, the curse will never leave the human race because the knowledge of it will survive eternally and will return many times to fight against you.

Sunday 25th of June

¹It should be known to all that your children have the right to freely and without fear to question the Gods about anything before the age of maturity ²because they are young and still haven't promised their soul to any particular God. ³However, after

the ritual of maturity, they must choose a God and promise themselves to him.

Monday 26th – Tuesday 27th of June

¹Someone early this morning awoke me at the entrance of the cave; at least, I believe that it was a person ²because again I found fish and fruit at the entrance. ³The voices have begun to speak: ⁴“This is a requirement that you must fulfill. If you praise the requirements in public while not observing them in private, then we the Gods will make your soul suffer. ⁵You will learn the sacred language, the language of this book, because we have chosen it as the language of the human race. ⁶The entirety of other languages you will give to history because they are not suitable for the path to be followed.”

Wednesday 28th of June

¹The perfect war player doesn't need to be a mountain, but nor can (he) be a stone because he is the guardian and the attacker of the people. ²He must possess the courage to accept that his life serves the people, and if required, he will offer it happily. ³He will always conduct himself honorably, reflecting the requirements of the Gods through all his actions.” ⁴I threw up the contents of my stomach the entire morning and saw that my hairs have started to separate from my head. ⁵The sickness that attacks my body is

progressing so fast that I can't say how much longer I have.

Thursday 29th of June

¹“It should be known to all, that you are forbidden to deceive others, except if you deception is made according to the following rules. ²You deceive only out of fear of pain or death, or to end a war between two people. ³However, deception is a dangerous affair because many deceptions lead to heavy memories.” ⁴I've finally discovered who left the food at my cave—it was a Blackman. ⁵I tried to speak to him, but he didn't understand my words, and having seen me, he immediately left. ⁶Then during the day, I begun to throw up a lot of blood from my mouth, and my hands began to lose their hair.

Friday 30th of June

Unwritten Entry.

July

Saturday 1st - Sunday 2nd of July

¹The entire morning, I threw up the contents of my stomach. The voices have spoken again; I must soon leave. ²“You will die in three days because the master of the universe in his anger ordered us to kill you by separation of your body, ³for we have broken his sacred rule, having entered your existence and given our knowledge. ⁴But all will be good because he is unhappy, but not bored, and the majority of our knowledge has reached your pages. ⁵So we sent to you Sireo to stand against our separation because the rules of our existence don’t rule over him. ⁶But his power can guard you for only three days. ⁷So make haste to Sale, place your diary in an easily found location, and we will send another to grab it. ⁸Don’t fear for your life because our word is just, and a pleasurable life you will have.”

Monday 3rd of July

¹I feel like my skin is hanging weakly from my bones, like only my will holds it. ²However, I need to say, before I breathe my final breath and go away to the great Paalo, ³that although this book might not please your ears and perhaps will disgust your senses, ⁴you must remember that the Gods don’t serve you, but you serve them, and

when the utility of your life becomes no more,
then you will perish like me. ⁵Even while writing
these weak words, I can feel my bones break, my
skin tear, and my hair fall out. ⁶My only hope is
that no one else will need to survive this suffering.
Now I need to sing the last song.

END OF DIARY

Original Transcript

January

Sunday 1st of January

¹Min alte ĝojigas la unua tago de ĉiu jaro. Ne nur pro tio, ke mi sane travivis la pasintan jaron, sed pli grave, ke mi esperiĝas pri la estonteco. ²Ankaŭ mi mensoge parolas, se mi ne konfesas la plezuron malfermi freŝan taglibron. ³Do, kie mi komencu tiun ĉi aldonon?—Mi respondis al Luiso, kies letero priskribis lian verkotan libron por katolikoj, kaj promesis, ke tuj post alveni en Viktorujo, mi sendos al li mian novan adreson. ⁴Ankaŭ mi skribis al Geoĝegono, por sciigi lin ke mi baldaŭ translokiĝos.

Monday 2nd of January

¹Hodiaŭ matene mi komencis purigi la ĉambron, sed post kelkaj minutoj la tuta afero fariĝis tiel laciga, ke mi decidis ĝin atendigi ĝis morgaŭ. ²Anstataŭe mi pasigis la matenon, senutile tralegante gazetojn forĵetotajn. ³Tiam ĉirkaŭ la sesa mi vespermanĝis kun Ano kaj Tomaso, dum ilia infaneto ludis ĉirkaŭ niaj piedoj. ⁴Ni interparolis pri diversaj aferoj, sed lia scio de la anglaj regnoj, super ĉio min interesis. ⁵Je la fino de nia tempo kune, mi rekompencis lin per botelo da vino.

Tuesday 3rd of January

¹Mi komencis la tagon ĉe la magazenoj, elserĉante novajn vestaĵojn por la proksima vojaĝo. ²Tiam vespere mi manĝis kun Davido kaj Sofia, sed veturante al la loĝejo poste, mi komencis demandi al mi—Ĉu la bonan vojon mi ja elektis? ³Ĉar kvankam mi jam postlasis la patrujon, la memoroj de ĝi neniel malfortiĝas. ⁴Eĉ nun, post tri monatoj, mia revenemo restas tiel profunde kiel komence.

⁵Kiu fumas la cigaron, ne plendu la fumon.

Wednesday 4th of January

Unwritten Entry.

Thursday 5th of January

¹Mi bezonis anstataŭigi kelkajn literojn de mia skribo stenografia, sed nun ĝi estas kiel eble pli densa kaj facile skribebla. ²Do uzante ĝin, mi kapablas skribi Esperanton tiel rapide kiel ĝin paroli, kaj ankaŭ povas konservi paperon kaj koston. ³Mi intencas alskribi Zamenhofon pri mia skribo, esperante, ke li ĝin prezentos al la publiko.

Friday 6th of January

¹Hieraŭ vespere mi promesis al mi, ke tuj post vekigi mi purigos la ĉambrom. ²Sed hodiaŭ okazis tiom multe da aliaj aferoj, ke mi tute forgesis mian promeson, ĝis la subita vesperiĝo. ³Nur tiam mi komencis la purigadon, ne haltante ĝis la ĉambro fariĝis sufiĉe malplena. ⁴Kvankam ankoraŭ restas

multe da laboro, mi almenaŭ hodiaŭ nokte bone dormos.

Saturday 7th of January

¹Mi ĵuras, ke Dio ridas je mi. ²Mi leviĝis tre frue, redonis la ŝlosilojn, longe trenadis miajn sakojn, kaj atendis la ŝipon tri horojn nur por eltrovi, ke hodiaŭ ĝi ne alvenos! ³Laŭ inspektoro ĉe la marponto, la ŝipo alvenos morgaŭ matene pro la veteraĉo. ⁴Tial mi devis pasigi la nokton en hotelo, ĉar uzebla lito jam mankis al mi. ⁵Tamen rigardinte tiun malpuran liton, mi pensas, ke nokte mi dormos terure.

Sunday 8th of January

¹Ho ve, mi tiel laciĝas, ke se montriĝus kuseno, mi tuj endormiĝus. ²Kaj tio multe plaĉus al mi, se la taglibra aldono jam estus skribita! ³Tial mi devige sidas tie ĉi, kun pezaj palpebroj, kaj lacaj manoj, pensante pri ĉio okazinta. ⁴Mi komencis la tagon ĉe la marponto, kaj atendis la kondukanton kun paperoj enmane. ⁵Mi memoras tiun momenton klare, ĉar permesite enŝipiĝi, mi ekhavis ĝojon kaj timon en la kor' ⁶kaj tiaj sentoj ankoraŭ akompanas min, eĉ nun post kelkaj horoj... ⁷Estas iel ridinde, ĉar kvankam tiu ĉi vojaĝo ankoraŭ ne komenciĝis, mi jam malfruiĝas.

⁸Adiaŭ je vi Plajmaŭto!

Monday 9th of January

¹Subaŭskultante du interparolantajn maristojn, mi aŭdis, ke frumatene ni eniris la golfon de Biskajo. ²Ankaŭ mi priaŭdis la veteron, kiu laŭ ili restos senpluva ĝis la vespero. ³Mi ĝojas je tiu novaĵo, ĉar la nuna vetero estas multe pli agrabla ol la akra pluvo, kiun mi trasuferis sur la Tamara. ⁴Vere la maro tie ĉi estas tiel glata, ke por mi estas malfacile apartigi ĝin de la blua ĉielo. ⁵Kaj se tri ŝipoj jam ne pasis malproksime, mi perdiĝus en ĝi.

Tuesday 10th of January

¹La tago rekomenciĝis per brila mateno kaj freŝa aero. ²Ni postlasis la golfon de Biskajo ĉe forta vento, vojaĝante eĉ pli rapide al Tenerifo. ³La maristoj diras, ke se la vento daŭros tiel forte, ni alvenos Ĵaŭdon. ⁴Por pasigi la tempon, mi tage sidis supraetaĝe legante librojn, ⁵kaj vespere mi rigardis kelkajn sinjorinojn ludi muzikajn seĝojn en la salono.

Wednesday 11th of January

¹Hodiaŭ la vetero estis agrabla kaj trankvila, apenaŭ ondeto videblis sur la supro de la maro. ²Sed nun la sanga luno regas la ĉielon, lumigante ĉion kiel lampo. ³Mi komencis mian tagon supraetaĝe, legante librojn sub kovraĵo starigita de la maristoj, ⁴kaj ĝin finis parolante al Sinjoro Hardingo pri la estonteco. ⁵Mi esperis, ke la maristoj elprenos niajn sakojn desube, sed tio

ankoraŭ ne okazis. ⁶Ankaŭ mi volas skribi, antaŭ ol mi forgesas, ke en la salono mi vidis negron.

Thursday 12th of January

¹Hodiaŭ mi vidis per miaj propraj okuloj la justecon de la maro. ²Hejtisto estis subordone ligita al la ŝipkolono per dika ŝnuro. ³Laŭ la kuiristo, li komencis sian laboron tro malfrue, tial suferos kelkajn tagojn subsune, por esti rememorigita pri siaj devoj. ⁴Tiam unu el la vojaĝantoj diris malĝentile al la negro apude "Rigardu vin mem, aŭ vi trovos vin tiel" sed la negro ne respondis je li. ⁵Anstataŭe li malaperis, tuj kiam la maristoj elprenis niajn sakojn.

Friday 13th of January

¹Hodiaŭ matene la unua vidaĵo, kiun renkontis la okuloj, estis la nubaj suproj de Santa-Cruz-Tenerifo. ²Ili estas preskaŭ du mil piedojn altaj, kaj ĉirkaŭprenas la urbeton kuŝantan en siaj ombroj... ³Ni alvenis ĉirkaŭ la oka, sed tuj kiam ni ektuŝis la teron, junaj knaboj alkuris nin, postulante monon kontraŭ fruktoj kaj nuksoj. ⁴Kaj nur post certa mona interŝanĝo, ili fine liberigis al ni la vojon. ⁵Unue nia grupo estis akompanata de la negro, sed baldaŭ li apartiĝis de ni laŭ sia propra vojo. ⁶Mi senkaŭze decidis postiri lin. ⁷Tamen mia tempo perdiĝis vane, ĉar li faris, esceptinte aĉeton de libro nenion skribindan. ⁸Ĉirkaŭ tagmezo ni ĉiuj revenis al la ŝipo, sed devis atendi ankoraŭ du perditajn virinojn, antaŭ ol ni povis foriri.

Saturday 14th of January

¹Ni havas nenion antaŭ ni, esceptinte la dancantajn ondojn, kaj la senfinan bluan de la maro, kiu ŝajnas pli kaj pli nigriĝi des pli da tagoj pasas. ²Hodiaŭ preskaŭ nenio interesa okazis, do mi havas malmulton priskribi. ³Nur fiŝaro tranĉanta tra la ondoj, kaptis niajn okulojn sufiĉe longe por rompi la longecon de la tago, ⁴sed denove ni bezonis atendi kelkajn horojn, antaŭ ol la suno fariĝis malpli brila, kaj ludo de kriketo povis komenciĝi. ⁵Tamen mi ne partoprenis en ĝi, ĉar pilko fluganta al la vizaĝo, ne aparte plaĉis al mi.

Sunday 15^h of January

¹Hodiaŭ la varmeco atingis naŭdek kaj preskaŭ boligis la ŝviton de mia kolo – ²Al Dio, mi ĵuras, ke se ĝi leviĝas eĉ iom pli alte, tiam la ĉielpordon mi baldaŭ frapos! ³Vere, mi aŭdis, ke du junaj hejtistoj tre malsaniĝadis pro la kolera varmo, kaj estis tuj ordonitaj al siaj litoj, ⁴sed feliĉe unu pliboniĝis rapide, tamen pri la alia mi ne scias. ⁵Almenaŭ la vespera balo donis al ni ĉiuj ion farindan.

Monday 16th of January

¹La tutan tagon la varmego min suferigis. ²Kelkajn fojojn mi bezonis viziti la banejon, sed mi ne estis sola, ³ĉar multaj decidis resti ĉambre, kaj ne eliris, esceptinte lavi sin.

Tuesday 17th of January

¹Hodiaŭ matene la kapitano ordonis la liberigon de la ŝnurita maristo, kiu sen devigo de ordonoj, tuj revenis al sia laboro. ²Ĝis tiam mi jam forgesis pri tiu bedaŭrinda homo, ³sed nun pensante pri li, mi ne povus imagi, kiel iu ajn povus travivi tiel longe sub la suno! ⁴Iam poste, mi eltrovis, ke la plejmulto de la maristoj sur la ŝipo, estis tie ĉi nur pro tio, ke la laborista unuiĝo kaj ŝipposedantoj disputis pri la kontrakto. ⁵Do en la lasta momento, la kapitano devis rapide trovi novajn maristojn, kiuj ŝajne venis el la plej nebulaj fontoj.

Wednesday 18th of January

¹Hodiaŭ matene maristo kun profunda vizaĝo, kiel eltrancita ligno, malfermigis al mi la okulojn pri la marista vivo. ²Kvankam li ofte parolis kun paŭzoj, kaj bezonis sin ripeti, la saĝeco de liaj rakontoj altiris al si miajn orelojn. ³Ekzemple dum parolado pri sia vivo, li subite sin interrompis, kaj montris la ruĝan ĉielon, kaj diris, ke baldaŭ venos grandaj nuboj da pluvo. ⁴La vetero montris lin prava, ĉar post ne pli ol ses horoj, komencis pluvegi, kaj ankoraŭ ne malfortiĝas. ⁵Sed bedaŭrinde mi ne povas diri tiajn afablaĵojn pri liaj kolegoj, ⁶aparte tiuj viroj, kiuj apenaŭ atingis plenaĝon. ⁷Ili havas la plej malnoblajn personecojn. ⁸Mi aŭdis, ke juna maristo rifuzis al naiva fraŭlino necesajn kuracilojn, ĝis ŝi konsentis lin kisi. ⁹La kapitano devas puni tiajn bestojn, antaŭ ol io eĉ pli danĝera

okazos, ¹⁰precipe kiam oni rigardas la fonton de lia nova maristaro!

Thursday 19th of January

¹Hodiaŭ estas tiel varme, ke la ŝvito falanta de mia kapo, apenaŭ atingas la paĝon. ²Sed mi ne plendu pri tio, ĉar malsimile al la hejtistoj malsupre, mi almenaŭ havas glaciajn drinkaĵojn dum la vespermanĝo. ³Ankaŭ mi observis, ke kelkaj tie ĉi ofte juĝas homojn ne pro iliaj meritoj sed laŭ la malnovaj klasoj, al kiuj ili apartenas. ⁴Ŝajnas, ke ju pli longe ni kunvojaĝas, des pli montriĝas la koloroj de tiaj homoj, kaj des pli sovaĝe ili turmentas la negron. ⁵Tamen estas des pli mirige, ke post ĉio ĉi, la negro ankoraŭ redonis miajn salutojn, pasante min en la salono.

Friday 20th of January

¹Hodiaŭ estis tre interesa tago, mi malkovris multajn popolkredojn, pri kio okazos, post transiri la linion. ²Ekzemple unu tro dika virino rakontis al mi pri kapitano, kies ŝipo renkontis longan muron, kiu dividas la mondon en du partojn! ³Kiam mi penis klarigi al ŝi, ke tio estas nebla, ŝi murmuris ion pri mia manko de jaroj, kaj obstine foriris. ⁴Post tio, mi parolis kun tri aliaj homoj, Skoto, nekonata verkisto, kaj hartondisto, kiu ofte sin kaŝas en la angulo. ⁵Unue mi pensis, ke mi povas teni agrablan interparolon kun la aŭtoro, ⁶sed post kelkaj minutoj, mi eltrovis, ke li fariĝis ne nur enuiga, sed ankaŭ malrespekta. ⁷Li tuj rifuzis

Esperanton sen scio de ĝiaj meritoj, ⁸dirante “kiu vere parolus tiun bastardan miksaĵon de Diaj lingvoj?” ⁹Mi lin evitos en la estonteco. ¹⁰Ho, jes, ankaŭ morgaŭ, mi partoprenos en ludo de ringoĵetado.

Saturday 21st of January

¹Hodiaŭ la homoj el la unua salono venkis nin en kriketo, sed poste ni ilin venkis en ringoĵetado. ²Vespere Sinjorino Estvudo prezentis al ni sian muzikan talenton, dum la pastro kondukis biblian grupon. ³Tamen esceptinte tiujn mallongajn aferojn ne multe okazis al ni. ⁴Mi komencas pensi, ke se la vojaĝo daŭros tiel enuige, mi eliros la harojn. ⁵Vere mi ne povas imagi kion mi faros, dum la vojaĝo inter Kapeurbo kaj Tasmanio. ⁶Almenaŭ mi povas diri, ke la vetero komencis pli malvarmiĝi, de post kiam ni transsaltis la linion.

Sunday 22nd of January

¹Dimanĉo estas la plej enuiga tago el la semajno, kaj la matena diservo estas la plej enuiga parto de la tago. ²Mi ne volas esti tie ĉi, sed mia manko ĉe la servo estus tuj rimarkita—³mi vere volas scii, ĉu mi ankoraŭ estas Kristano aŭ ĉu mi simple herediton de la gepatroj. ⁴Ŝajnas al mi, ke denove mi havas nenion gravan priskribi, do tre baldaŭ mi iros al la lito.

Monday 23rd of January

¹Ŝajnas al mi, ke ju pli longe mi estas sur la maro, des pli longiĝas la tagoj, dum nur la vetero konstante ŝanĝiĝas. ²Sed kiom da fojoj mi povas priskribi la veteron, antaŭ ol miaj aldonoj fariĝas enuigaj? ³La tago komenciĝis per malvarmiga vento kaj facilaj ondoj. ⁴Mi vekigis al preskaŭ sennuba ĉielo, kaj malbona sento en la stomako, ⁵ĉar mi povas antaŭvidi en tiu momento, mian tutan tagan ripetadon. ⁶La sola interesa afero, kiun mi rimarkis, estis la negro, sole leganta sian binditan libron, kun lia dorso kontraŭ la salona muro. ⁷Mi deziris komenci interparolon kun li, sed proksimiĝante, mi perdis mian kuraĝon kaj flugis en la alian direkton.

Tuesday 24th of January

¹Hodiaŭ matene mi kaj tri aliaj vojaĝantoj rigardis du maristojn batali unu kontraŭ la alia. ²Oni diris, ke unu el ili faris siajn devojn tro malrapide, kaj tial la aliaj maristoj fariĝis koleraĵ.

Wednesday 25th of January

¹La negro sidas ĉe malproksima tablo, transskribante ion de lia libro al alia ĵurnalo. ²De tie ĉi, mi ne povas vidi la paĝojn de tiuj libroj. ³Mi decidis, ke por pasigi la tempon ĝis nia alveno ĉe Kapeurbo, ⁴mi penos eltrovi pri kio li skribas.

Thursday 26th of January

¹Hodiaŭ maljuna advokato el la apuda salono, preskaŭ defalis de la ŝipo. ²Laŭ Sinjorino Karo, lia senkompata laboro difektis al li la memoron. ³Tial li bezonas pasigi liajn tagojn senlabore por ke lia sano pliboniĝu. ⁴Sed ŝajnas al mi, ke tio malmulte helpis al li.

Friday 27th of January

¹Promenante ĉirkaŭ la ŝipon, mi pasis la ĉambron de la negro, kiam sonoj elirantaj haltigis min. ²Mi rigardis tra lia fenestro senpense; sed nun bedaŭras tiun agon, ĉar tio, kion mi vidis, timigis min. ³La negro sidis en la mezo de la ĉambro sur tapiŝo, ĉirkaŭita de tri kandeloj, kiuj lumigis lian vizaĝon flave. ⁴Li senmove sin rigardis en la spegulo, parolante al si per nekonata lingvo. ⁵Ambaŭ miaj okuloj pli proksimiĝis al tiu vidaĵo, kiam subite lia spegulaĵo vizaĝis rekte al mi. ⁶Mia koro preskaŭ saltis el la brusto, dum la piedoj ekkurigis min al mia ĉambro. ⁷Tie mi petis al Dio, pri kion mi devas fari, ⁸ĉu la negro faris sorĉon? ĉu li min vidis? kaj se jes, ĉu li min konis? Kion mi do faru!?

Saturday 28th of January

¹Hieraŭ mi sonĝis, ke la negro dancis kaj kantis en mia ĉambro, kiel sorĉisto. ²Kelkajn fojojn mi vekigis pro timo, sed ekdorminte denove, mi revidis lian vizaĝon ĉie, ³kaj interese dum momento mi vidis la numeron dek du sur lia frunto. ⁴Mi komencis pensi, ĉu mi sciigu la aliajn

vojaĝantojn aŭ restu silenta, ĉar mi ne volas kaŭzi malfacilojn.

⁵Lin mi ne revidis, antaŭ ol li sidis rekte post mi ĉe la manĝejo. ⁶Tio ne multe timigis min, ĉar mi sidis inter kelkaj aliaj. ⁷Sed mi parolas mensoge, se mi ne konfesas, ke tiaj fosantaj okuloj kontraŭ la dorso, ne sentigis al mi maltrankvilon. ⁸Post tio mi ĉiam moviĝis kun aliaj.

Sunday 29th of January

¹Hodiaŭ matene ni alvenis ĉe Kapeurbo, kiu ŝajnis al miaj okuloj angla kun iom da holanda influo.

²Sed mi ne estis tiel entuziasme kiel miaj kunvojaĝantoj, ĉar mi timis solecon kun la negro, ³kaj miaj timoj fariĝis realaj, kiam li aperis apud mi en la strato demandante “Kion vi vidis?” ⁴Li eĉ ne penis kaŝi la fakton, ke mi lin vidis ⁵“Vi estas sorĉisto!” mi laŭte diris, tamen li afable interrompis min, dirante, ke mi ne komprenis la situacion. ⁶Tiam li min invitis al sia ĉambro por vespermanĝi! ⁷Dio mia, mi konsentis! Kial? Mi nun devas foriri.

Monday 30th of January

¹Mi travivis la nokton! Kiam mi eniris la ĉambron de la negro, ²li sidigis min, kaj tuj komencis demandi al mi pri miaj kredoj. ³Mi respondis, ke mi estas Kristano. ⁴“Kial vi estas Kristano?” li diris, tia demando kaptis mian intereson, ⁵do mi aldonis “Ĉar mi kredas al la dieco de Kristo” ⁶Denove li demandis min “Kiel vi povas kredi al

tio? ⁷Ĉu vi ja renkontis Kriston?”—tiajn demandojn li senĉese ĵetis al mi, sed ĉiam parolante ĝentile, serĉante miajn kredojn profunde. ⁸Post eble unu horo, mi sciis en la spirito, ke mi estas nur Kristano pro heredo. ⁹Je la fino mi forte demandis al li “Ĉu vi kredas al Dio?” ¹⁰al tio li respondis afable “En la estonteco mi montrus miajn kredojn, sed nun vi estas tute ne preta” ¹¹Mi kredas, ke li estas Afrika Hebreo, ĉar tiaj homoj estas tre misteraj.

Tuesday 31st of January

¹Hieraŭ nokte la ŝipo balanciĝis tiel sovaĝe sur la ondoj, ke mi pasigis la tutan nokton elĵetante la enhavaĵon de mia stomako. ²Tial mankas al mi hodiaŭ la energio por finskribi tiun ĉi aldonon.

February

Wednesday 1st of February

¹La vetero estas terure malvarma kaj venta. ²Mi rimarkis, ke tiuj, kiuj komence ŝajnis sana, nun ŝajnas la plej malsana. ³Ĉirkaŭ tagmezo mi iris renkonte al Slatino, kiu preparolis diversajn aferojn, sed mi precipe zorgis pri lia religio. ⁴Li rakontis al mi ke, la tribo de liaj gepatroj estis detruita per Orientlaŭduloj, ⁵kaj nun la religio ekzistas dise ĉirkaŭ la mondo. ⁶La tradukita nomo de la religio signifas “La Diaron” kiu havas sencon, ĉar ekzistas dek du Dioj en la religio. ⁷Laŭ li, tiuj Dioj apartenas al tri apartaj grupoj. ⁸La malnovaj Dioj estas la plej gravaj, sub kiuj troviĝas la malgravaj Dioj, sub kiuj troviĝas la eksteraj Dioj. ⁹Ĉiuj Dioj estas en ĉiela loko nomata “La Paalo de la Dioj” ie post la malproksimaj steloj. ¹⁰Mi demandis al li pri kial li vojaĝas al Aŭstralio, al kiu li respondis “Mi volas eviti la venontajn militojn” ¹¹Mi havis multajn aliajn demandojn, sed li denove fariĝis malsana kaj devis reveni al sia ĉambro.

Thursday 2nd of February

¹Hodiaŭ mi rigardis grandan balenon je ne pli ol dudek jardoj malproksime. ²Ĝi estis tiel longe kiel nia ŝipo, imagu do, kiom da graso ĝi havas.

Friday 3rd of February

Unwritten Entry.

Saturday 4th of February

¹Mi komencas deziri la estintan varmon, ĉar ĉiu tago nun komenciĝas pli malvarma ol la antaŭa. ²Oni diras, ke la malvarmo daŭros tiel ankoraŭ semajnon, sed poste varmiĝos. ³Ĉirkaŭ tagmezo la Krozetaj Insuloj la unuan fojon vidiĝis al la okuloj, ili ŝajnis kiel frostigitaj ŝtonoj, starantaj el la maro. ⁴Mi kaj Slatino sidis kune sur la supra etaĝo, kaj interparolis pri niaj kredoj. ⁵Jen tio, kion li diris "kiam vi bezonas ion, tiam al via Dio parolu, kaj se vi jam subtenis lin fidele, li vin subtenos. ⁶Tamen se ofte ŝanĝiĝas via fideleco, kompreneble venos al vi nenio" ⁷Mi demandis al li, kial oni volus ŝanĝi Diojn, al kiu li respondis "Ĉiu Dio havas siajn fortojn kaj malfortojn" ⁸Mi flanke aludis, ke lia sistemo de Dioj estas tro malsimpla, al kiu ⁹li ŝerceme respondis "Jes ja, se vi komparas ĝin al Kristo, kiu naskiĝis al la mondo nur por morti sur la kruco, kaj tial savi nin de la pekoj"

Sunday 5th of February

¹Hodiaŭ la varmalteco estis tiel malalta, ke mi decidis kuŝi en la lito preskaŭ la tutan tagon. ²Sed de tempo al tempo mi ĉirkaŭpromenis la etaĝojn, aŭ vizitis la manĝejon.

Monday 6th of February

¹Ĉirkaŭ la unua ni pasis proksime de la Kegruelaj Insuloj. ²La kapitano elprenis sian rigardilon, kaj ekzamenis la bordon. ³Ni rigardis ĝin dum kelkaj horoj sed vidis nenion esceptinte senarbajn ŝtonojn kaj birdarojn. ⁴Tamen inter tiom multe da akvo estas bonege revidi sekan teron. ⁵Poste mi kaj Slatino interparolis mallongan tempon pri lia religio. ⁶Mi eltrovis, ke lia persona Dio estas Emuaho, kiu estas spegulita tra la spidero, kaj superregas la teraĵon polvo. ⁷Laŭ li ĉiuj Dioj estas spegulitaj tra siaj propraj bestoj, kaj superregas apartajn teraĵojn. ⁸Li invitis min al lia ĉambro morgaŭ vespere por prezenti ion novan. ⁹Mi senpacience atendas tiun momenton, aparte ĉar la tagoj en tiu ĉi ŝipo fariĝis tre enuigaj.

Tuesday 7th of February

¹En la ĉambro de Slatino mi observis misteran Diagon. ²Li metis tapiŝon en la mezo de la ĉambro tiel, ke sidante sur ĝi, li povis sin vidi en la kontraŭa spegulo. ³Li zorgeme demetis de si la ringon, kaj metis ĝin antaŭ la spegulon, ĉirkaŭante sin per tri kandeloj. ⁴Tiam li ordonis al mi estingu la lampojn kaj estu silenta. ⁵Mi lin rigardis kelkajn minutojn sed li faris nenion, esceptinte rigardi sin en la spegulo antaŭ siaj okuloj. ⁶Post longa tempo li subite rompis la silentecon per alilandaj vortoj. ⁷La tuta afero daŭris eble dek minutojn, kaj konsistis el parolado, silento, kaj denove parolado.

⁸Je la fino li staris kaj elblovis la kandelojn. ⁹Kiam mi estis certa, ke la Di-ago ja finiĝis, mi komencis demandi lin pri tio, kion mi vidis. ¹⁰Li respondis, ke "Mi petis Emuahon, ĉu mi estas permesite instrui al vi la verecon de la Dioj, kaj ŝi ja donis al mi la bezonatan permeson. ¹¹Do kiam vi deziras komenci vian lernadon?" ¹²Nature mi respondis "Plej baldaŭ!"

Wednesday 8th of February

¹Ekzistas dek tri Dioj, Tulpo la kato, Sereco la hundo, Nutaso la Leono, Ekamekamo la serpento, ²Tigano la ĉevalo, Traeo la azeno, Sramo la kapro, Emuaho la spidero, Etipujo la krokodilo, ³Rukremo la fiŝo, Enupeno la ĉiropetro, Sunevo la rato, kaj Sireo la senbesta kaj neinvitita Dio. ⁴Ankaŭ ekzistas du domoj, la domo Forto estas kondukata de Etipujo kaj Nutaso, ⁵dum la domo Kredo estas kondukata de Tigano kaj Enupeno. ⁶Slatino aldonis, ke mi bezonas trovi mian econ, antaŭ ol estas permesite ke mi elektu Dion – ⁷Laŭ li, ĉiuj homoj havas sian propran karakteran personecon, kiu apartenas al unu el la ses grupoj – ⁸La faruloj, pensuloj, kreuloj, helpuloj, konvinkuloj, kaj stariguloj. ⁹Do dum la venonta semajno, mi min rigardos en ĉia situacio, por eltrovi mian propran econ.

Thursday 9th of February

¹Mi ankoraŭ ne eltrovis mian econ, sed eble ĉar plaĉas al mi skribi taglibrojn, mi estas vere

pensulo. ²Pli frue mi postulis Slatinon pri lia nomo, ĉar kelkajn fojojn mi alvokis lian antaŭnomon, al kiu li ne respondis. ³Demandite pri tio, li aludis al mi, ke li havas multajn nomojn. ⁴Sed neniu ekstere de la familio estas permesite koni la spiritnomon, ĉar oni povus uzi ĝin kontraŭ li.

Friday 10th of February

¹La vetero komencis varmiĝi. Mi ankoraŭ ne eltrovis mian econ.

Saturday 11th of February

¹Hodiaŭ, forta vento pelis nian ŝipon preskaŭ tri cent mejlojn en dekdu horoj. ²Ni komencis la tagon per ludo de saka rampado, kaj ĝin finis per longa saltado. ³La dua estis aparte ridiga, precipe kiam la ŝipo ekŝancelis, kaj renversis la saltantojn. ⁴Vespere okazis la longe atendita balo, en kiu multaj kostumoj estis paraditaj; ⁵kiaj indiano, kabalero, ruso, harlekeno, kaj sorĉisto. ⁶Slatino ne partoprenis en la okazo, do mi trovis min ĉe la verŝotablo rigardante la festojn sole. ⁷Eble tio signifas, ke mi ne estas farulo, aŭ eble mi estas nur enuiga homo.

Sunday 12th of February

¹Hodiaŭ mi interparolis kun Sinjoro Brasĉo pri liaj opinioj de aliaj religioj. ²Li estis akceptema al la ebleco de aliaj kredoj, kaj eĉ konsentis ke aliaj religioj eble havas pli da merito ol lia propra.

³Tamen ankaŭ li klarigis al mi, ke la Kristana Dio ĉiam helpis al li. ⁴Do li ne bezonis elserĉi anstataŭigajn Diojn. ⁵Poste mi parolis al Slatino, kiu diris, ke li intencos vojaĝi de Tasmanio al Kvinslando. ⁶Tiu sciigo multe ĝojigas min, ĉar mi bedaŭrus lian mankon, se mi ne jam ellernis liajn kredojn plene. ⁷Li ordonis, ke mi daŭrigu la serĉadon de mia eco, kiam mi aludis, ke mi estas pensulo.

Monday 13th of February

Unwritten Entry.

Tuesday 14th of February

¹Hodiaŭ matene la alia salono prezentis al ni teatraĵon. ²Post la prezentado, la kapitano laŭdis la ĉefrolulojn kaj donacis al ili vinbotelon. ³Mi nun estas tute certa, ke mi estas pensulo, do morgaŭ mi sciigos Slatinon.

Wednesday 15th of February

¹Hodiaŭ dum leciono de belskribado, mi eltrovis, ke mia skribkapablo egalas al tiu de infano. ²Poste Slatino kaj mi mallonge interparolis pri lia religio. ³Li diris ke mi povas elekti inter du Dioj, Nutaso kaj Ekamekamo, ĉar tiuj Dioj apartenas al la pensuloj. ⁴Mi decidis elekti Nutason kiel mian propran Dion, ĉar ŝi edziniĝis kun Etipujo, la plej forta el ĉiuj Dioj, ⁵kaj ni ĉiuj ja scias ke la edzino regas la edzon, tial mi efektive havos du Diojn sub mia influo. ⁶Due ŝin spegulas la leono.

Thursday 16th of February

¹Estas dirate, ke se ĉio iras glate, ni atingos Hobarton morgaŭ matene. ²Aŭdinte tiun novaĵon, kelkaj decidis starigi feston kun muziko kaj dancado. ³Mi decidis rigardi ĝin de la barandilo, sed post du horoj, ⁴mi revenis al la ĉambro, ne partopreninte.

Friday 17th of February

¹Mi vekigis al la plezura vido de malproksimaj montoj sub la matena suno. ²Tio donis al miaj piedoj grandan dancemon. ³Vere tiuj ĉi modestaj vortoj ne povas esprimi la feliĉon, kiun mi sentis je la vido de seka tero, post tiom multe da semajnoj sur la senfina maro. ⁴Hobarto estas unu el la plej agrablaj urboj, kiu iam ajn renkontis miajn okulojn. ⁵Alveninte mi iris rekte al la drinkejo por festi nian bonan alvenon.

Saturday 18th of February

¹Kia tago! De kie mi komencu tiun ĉi aldonon? ²Hieraŭ nokte mi rampis al la lito iam post la noktomezo, kaj ne leviĝis ĝis vekis min laŭtaj frapoj je la pordo. ³Slatino estis min atendanta, kaj eĉ helpis al mi teni la sakojn, dum ni kuris al la veturilaro. ⁴Estis bedaŭrinde, ke mi ne povis resti pli longe, ĉar Hobarto tre plaĉas al la okuloj. ⁵Nia veturilaro vojaĝis al Laŭncestono laŭ la plej sovaĝaj vojoj, serpentumante tiel rapide, ke la kolo preskaŭ rompiĝis. ⁶Alveninte ĉe la stacidomo, ni forkuris al la ŝipeto, kaj ensaltis la fermentajn

pordojn. ⁷La nuna vojaĝo estas pli timiga ol la veturilaro kaj ŝipo kunigitaj, ⁸mi antaŭtimas noktan vojaĝon.

Sunday 19th of February

¹Mi foriras

Monday 20th – Tuesday 21st of February

Unwritten Entry.

Wednesday 22nd of February

¹Mi jam aŭdis pri la kapitalaj malfaciloj de Melburno, eĉ antaŭ ol mi alvenis ĉe la pordoj de tiu ĉi urbo, ²sed la grandeco de la situacio ankoraŭ mirigas min. ³Preskaŭ sur ĉiu strato sidas senlaboruloj, esperantaj por la veno de nova laboro. ⁴Sed mi ne intencas resti tie ĉi tiom longe, ke la vereco de la situacio min batos. ⁵Mi intencas vojaĝi al la orienta urbo de Saleo. ⁶Sed ankaŭ tiu vojo kondukas al siaj propraj malfaciloj, ĉar mi legis en la gazeto, ke granda fajro en la oriento forbruligas ĉion. ⁷Do mi esperas, ke nenia malboneco trovos min dum la vojaĝo al Saleo. ⁸Precipe ĉar mi apartiĝis de Slatino en Melburno, kaj nun vojaĝas sole. ⁹Sed li lasis post si sian libron.

Thursday 23rd of February

¹Saleo estas tre bela kaj nova urbeto, se oni juĝas ĝin laŭ la loko. ²Alveninte ĉe la stacidomo, mi promenis laŭ Rajmonda Strato ĝis mi trovis la

Kronan Hotelon. ³Tiam mi elserĉis Lukeon, kiu troviĝis en la ĉefa salono. ⁴Li tuj havigis al mi laboron kaj ĉambron. ⁵Nun ripozinte, mi povas malfermi la libron, kaj komenci la tralegadon... ⁶Ĉiu paĝo enhavas tri apartajn pecojn. ⁷Granda alimonda pentraĵo regas la centron de ĉiuj paĝoj, kaj havas ĉe ambaŭ flankoj du skribojn. ⁸La maldekstra el tiuj skriboj apartenas al la hispana, sed la alian mi ne konas. ⁹Mi kredas, ke la hispana estas nur traduko de la alia skribo, pro la gramatikaj formoj uzitaj.

Friday 24th of February

¹Traleigante la hispanan tradukon, mi eltrovis, ke la alspiritparolisto Carjata donis gravan paroladon, kiu dum sia vivo ŝanĝis sian tribon. ²Jen la enhavaĵo de tiu parolado “Mi jam parolis al Etipuĵo la Dio de polvo, kiu respondis, ke por atingi la kvaran ŝtupon de nia disvolvo, ³ni devas ŝanĝiĝi laŭ la abelujo. ⁴Tial el nia tribo leviĝu kvar grupoj, la militludistoj, la subtenistoj, la scimanĝistoj, kaj la alspiritparolistoj. ⁵La militludistoj defendos la tribon. ⁶La subtenistoj enterigos la semon. ⁷La alspiritparolistoj gardos la religion, dum la scimanĝistoj disvolvos la genton.

Saturday 25th of February

¹Hodiaŭ mi vidis sapolion en la magazeno de Valter-Ljono. ²Mi neniam imagis, ke mi vidus ĝin denove en tie ĉi malproksima lando. ³Ankaŭ mi devas skribi mian dankon por la kuzo, kiu ne nur

multe helpis min, sed ankaŭ gardis min kontraŭ la kolero de la lokanoj. ⁴Ili ofte plendas, ke alilandanoj ŝtelas siajn laborajn oportunojn, kaj ili eĉ rigardas melburnanojn tiel. ⁵Hodiaŭ ankaŭ mi tradukis paĝon pri Nutaso, kio diras, ke ŝi superregas la teraĵon de fajro. ⁶Do parolante al ŝi, mi devas uzi la fajron kiel la ĉefa teraĵo, ⁷sed mi nenion eltrovis pri kiel oni komencas tiun komunikadon.

Sunday 26th of February

¹Hieraŭ nokte mi havis la plej malagrablan sonĝon, kiun mi povas memori—²Mi staris en granda domo sub rompita tegmento, tra kiu brilis radio de blanka lumo. ³En la sonĝo, mi decidis senpense pasigi la manon tra la lumo, ⁴sed farinte tion, granda bruliga sento batis la manon, kaŭzante al mi tiom da doloro, ke mi saltis malantaŭen, kaj preskaŭ falis. ⁵La haŭto sur mia mano brilis ruĝe kun la sigelo de Nutaso. ⁶Mi volis tuŝi ĝin, sed en tiu momento mi vekigis. ⁷La sonĝo tre maltrankviligis min, tial poste mi decidis viziti la preĝejon. ⁸Sed la saĝeco de pastro eĉ ne povis helpi min, ⁹kaj kiam mi revenis al la domo, mi trovis la libron en atendo de mi. ¹⁰Ŝajnis, kiel io en ĝia kerno vivas kaj spiras, tio donis al mi malbonan senton.

Monday 27th of February

¹Hodiaŭ mi vidis grandan amason da kanguruoj ĉe Velintona Lago. ²Lukeo diris, ke ili portas siajn

infanojn en ventraj poŝoj. ³Unue mi ne kredis al li, sed nun vidinte ĝin per miaj propraj okuloj, ⁴mi povas honeste atesti, ke de Ameriko ĝis Anglujo, mi neniam vidis tiel miksitajn bestojn, ⁵ĝi ja portas siajn infanojn poŝe. ⁶Mi aparte volas priskribi ĝian movadon, ĉar ĝi saltas kiel rabeto, sed moviĝas tiel rapide kiel ĉevalo. ⁷Tamen ĝia formo similas je rato kaj hundo miksitaj.

Tuesday 28th of February

¹Farante aliajn aferojn, mi retrovis la libron sole sur la tablo. ²Mi malfermis ĝin kun la intenco iom legi, sed nun ne povas formeti ĝin.

March

Wednesday 1st of March

¹Tradukante la dudek trian paroladon de Vajeso, mi lernis promesi la animon al mia elektita Dio
²“Tri tagojn mi supreniris sur tiun monton, sole kaj timigite, necerte pri mia sorto. ³Tamen alproksimiĝante al la supro, mi trovis min akompanata de tri Kontombiloj. ⁴Ili kondukis min en la internajon de la monto, kie mi lernis la Di-agon de la ŝtono. ⁵Tiun saman Di-agon, kiun vi ĉiuj devas ellerni ⁶“Demetu la ringon” ili ordonis “kaj metu ĝin sur tiun ĉi purigitan ŝtonon” ili aldonis. ⁷Mi faris iliajn ordonojn senhezite ⁸“Tiuj ringo kaj loko de tiam fariĝos sanktaj al vi, montru ilin al neniuj, aŭ malamikoj povas uzi ilin kontraŭ vi” ⁹Poste ili instruis al mi la Di-agon de enmetado. ¹⁰Mi finis mian tradukon tie, ĉar mi volis peni la Di-agon dum mi legas pri ĝi. ¹¹Do mi prenis tre amatan poŝhorloĝon, kiun mia patro donacis al mi, kaj elserĉis mian propran sanktejon. ¹²Post certa tempo mi trovis kaŝitan rivereton, kaj rekomencis legi ĉe ĝia bordo. ¹³Laŭ la libro mi devas fari la Di-agon de enmetado, ¹⁴sed en tiu momento mi sentis min ne preta por ligi min al Nutaso, ¹⁵do decidis anstataŭe danki ŝin por ŝiaj tempo kaj pacienco. ¹⁶Mi esperas, ke mi ne ofendis ŝin aŭ Dion.

Thursday 2nd of March

¹Mi vekigiĝis iom pli frue ol kutime, kaj ne povis tuj endormiĝi, tial decidis fari iom da tradukado.
²Hodiaŭ mi direktis miajn penojn al la tridek naŭa parolado de Ostuo, kiu priskribas la promeson kaj kio okazus se mi ĝin rompus. ³“Laŭco estis subtenisto de la tribo, kiu laŭte plendis al ĉiuj pri la malhelpeco de sia Diino Sereco, ⁴dum private li promesas sin al aliaj Dioj. Sed ne konata al li, Sereco jam eksciis lian trompadon, kaj intencis mortpuni lin. ⁵Sed ŝi ne tuj prenis lian vivon, ne, ŝi atendis kaj atendis, multajn jarojn ŝi fakte atendis. ⁶Ĝis fine, Laŭco forgesis pri ŝi kaj sia trompo. ⁷Tiam dum vizito al la rivero, granda ondo kaptis Laŭcon kaj tiris lin al akva tombo. ⁸Kvankam tio ne okazis al Nopuso la scimanĝisto, ĉar li sciis la sorton de Laŭco. ⁹Kaj kiam li elektis ŝanĝi sian promeson al Ekamekamo, Nopuso zorgeme tranĉis sian haŭton kun la nomo de Ekamekamo. ¹⁰Tia ago honoris Ekamekamon, kaj tial Nopuso estis gardita kontraŭ la kolero de Emuah, ¹¹eĉ kiam ŝi ĵetis al li ŝtonegon el la nigra ĉielo”

Friday 3rd of March

¹Estas aŭdite, ke la poŝtservo inter Saleo kaj Mafro baldaŭ fariĝos pli malofta, precipe pro la kapitalaj malfaciloj de la nuna registaro. ²Tiu novaĵo multe ĉagrenas la urbanojn, kiuj timas, ke la malfaciloj de Melburno baldaŭ venos al Saleo. ³Post la laboro, mi komencis traduki tekston pri la Di-ago de

demandado, kiu rememorigas min pri Slatino, kaj tiun Di-agon li faris en la ŝipo. ⁴Laŭ mia kompreniĝo, oni uzas la Di-agon de demandado por klarigi malfacilajn demandojn, kiujn ili havas. ⁵Laŭ ĝi, vi devas paroli al via spegulaĵo, kiel vi parolus al Dio mem, kaj se vi honeste kredas al li, tiam havigos al vi la respondon deziratan. ⁶La tuta ideo ŝajnas al mi tre interesa, kaj mi volas ĝin provi, ⁷sed mi ankoraŭ ne promesis min al iu ajn Dio, tial estus senutile provi ĝin.

Saturday 4th of March

¹La oka parolado de Vajeso priskribas la lokon, kie la Dioj troviĝas. ²La tuto de ĝi ŝajnis al mi tre mistera, do mi decidis transskribi ĝin tie ĉi. ³"Ne imagu la Paalon de la Dioj en la senco de ordinara paalo, kun planko, muroj, kaj plafono, ĉar tiaj mondaĵoj ne ekzistas tie. ⁴Se io en la Paalo de la Dioj similas je muro, tiam ne kredu al la vido, ĉar povas esti la pensoj de dormanta besto. ⁵Se io similas je plafono, tiam ne kredu al la vido denove, ĉar tio povas esti brulanta neĝo. ⁶En tiu loko ne troveblas la logiko de nia mondo. ⁷Tial vi devas memori, ke neniu povas priskribi tiun lokon, kaj ĉiu peno, eĉ farata de mi, estu uzata nur kiel helpilo. ⁸Ĉar la Paalo de la Dioj estas super ĉiu kompreno" ⁹La dua parto de tiu parolado des pli konfuzis min.

Sunday 5th of March

¹La lastajn tagojn mi multe pensis pri la promeso, kaj venis al la decido, ke baldaŭ mi ĝin faros.

²Tamen unue mi volas lerni la religion pli profunde, ĉar mi ne volas fari ion naive, kion en la estonteco mi bedaŭrus. ³Do mi daŭrigis miajn penojn de tradukado, ĝis mi trovis tiun ĉi interesan paroladon. ⁴“Longe antaŭ la triboj ekzistis, la Mastro de ĉio sendis al la stelaroj po kvar dioj, kun la jenaj ordonoj—⁵Kreu vivon ĉie, en ĉiu angulo de la steloj, kaj laŭ ĉiuj formoj. ⁶Se vi plenigos tiujn ordonojn plaĉe, mi gardos vin kontraŭ la fina renovigo, sed se la vivoj kreotaj malplaĉos al mi, tiam mi vin pereigos. ⁷La malnovaj Dioj tiam rakontis al mi la historion de la homaro—⁸post nemezurebla tempo la Dioj kreis el la senfinaj maroj novajn vivaĵojn, kiuj post certa tempo malrapide ŝanĝiĝas al la eksteraj Dioj, kiuj do ankaŭ kreis aldonajn vivaĵojn. ⁹Tio estas la fonto de nia ekzisto, ĉar ni estas la lastaj el tiuj kreaĵoj”

Monday 6th of March

¹Estis malfacile traduki tiun ĉi parton de la libro, ĉar kelkaj paĝoj estas rompitaĵoj. ²Mi devis detale rigardi ĉiun vorton por eltrovi ĝian signifon. ³Jen la rezultato de miaj penoj—⁴La sesa parolado de Vajeso “La Mastro de ĉio moviĝadas memvole inter kreado kaj renovigado. ⁵Ĝi kreis la malnovajn Diojn, kiel nur laborilojn por malenuigi sin, ⁶tial estus malsaĝe kredi, ke ĝi prizorgus viajn simplajn

dezirojn. ⁷Ne, plaĉas al ĝi rigardi nur la tuton. ⁸Se la malnovaj Dioj ĝin interesus, ĉio estos bone, tamen se la Dioj ĝin enuigus, ĝi ĉion renovigos. ⁹Tial la malnovaj Dioj sciigis la bestojn de nia stelejo pri sia ekzisto, ĉar la Dioj bezonas, ke ĉiu besto disvolvu sin egale per paco, amo, eltrovo kaj milito, ¹⁰ĉar tiajn agojn la plej granda Dio ĝojas rigardi” ¹¹Tiu ĉi paĝo multe timigas min, imagu do grandan Dion, kiu superregas ĉion, kaj pro ne pli ol enuo povas ĉion detru.

Tuesday 7th of March

¹Mi ofte legas paĝojn en la libro, kiuj priskribas diversajn postulojn. ²La jena estas unu el tiuj postuloj, kiu troviĝas sur la deka paĝo ³“Jen postulo, kiun vi devas plenigi, se vi laŭdas la postulojn publike, malobservante ilin private, tiam ni la Dioj suferigos vian animon—⁴Vi forigu la kredon de la superaj homoj. Nek sekso, nek haŭto, nek gento estas pli superaj en komparo kun la aliaj, ⁵kaj ĝis la makulo de supereco estas purigata, vi ĉiuj estos blindaj al la ebleco de la homaro, dum vi mem pereos en la Paalo de la Dioj” ⁶Jen alia postulo, ankaŭ ĝi komenciĝis kiel la lasta ⁷“—Vi penu atingi la stelojn, por eltrovi la sekretojn de la Dioj, ĉar vi estas kiel infanoj, kiuj timas postlasi la nutristinon”

Wednesday 8th of March

¹Pli frue hodiaŭ mi legis pri kelkaj postuloj, kiuj ŝajnas preskaŭ kristanaj ²“—Vi respektu aliajn

homojn kiel vin mem, sed se ili malamike agas kontraŭ vi, tiam forigu ilin de via apudesto”³jen alia “—Vi forte donu justecon en la okazo de devigo, sed ĉiam estu preta indulgi,⁴se la erarinto konfesas siajn erarojn vole kaj honeste, ĉar neniu scias la tutan kaŭzon de okazintaĵoj”⁵ la jena postulo aparte plaĉas al mi “—Vi ekzameni ĉion, kaj se vi trovas ion malveran, tiam vi forigu ĝin senpense”⁶Tamen la lasta postulo klarigis multon⁷“—Vi instru la verecon de la Dioj al ĉiuj pretaj aŭdi ĝin, sed nur se ili volas la veron”⁸Nun mi scias, kial Slatino parolis al la Dioj, antaŭ ol li komencis instrui min.

Thursday 9th of March

¹Oni dediĉis grandan parton de la libro al paroladoj de gravaj homoj, kiuj estigis la kredojn de la skribintoj, sed la cetero estas senorda.

²Ekzemple mi trovis la jenan postulon “—Vi respektu la kredojn de aliaj homoj, sed se iliaj kredoj kontraŭstaras la proprajn, tiam vi forte kontraŭstaros ilin.”³Tiu postulo ial kuŝis antaŭ la naŭa parolado⁴“Via nomo estas sankta, kaj havas en ĝi gravan influon super vi, en tiu ĉi mondo kaj la Paalo de la Dioj, tial vi devas havi tri nomojn.

⁵La naskiĝnomon, patrinnomon, kaj unu el la Kontombilaj nomoj, kiuj venas de la dia lingvo”

⁶Mi trovis nenion pri la Kontombilaj nomoj en la sekvantaj paĝoj.

Friday 10th of March

¹Jen la kvara parolado de Vajeso, kiun mi decidis traduki pro intereso ²“La Dioj kaj ĉiu besto havas la saman sorton je la fina renovigo, se ili ne gajnas sufiĉan potencon en la stelejaro. ³Ĉar la granda mastro pereigos ĉiujn bestojn, esceptinte tiujn, kiuj fariĝas al ĝi utilaj. ⁴Do la Dioj ofte batalas kontraŭ unu la alia, por la pozicio, potenco, kaj animoj de siaj fidelaj kredantoj. ⁵Simple ju pli da animoj sub la influo de iu aparta Dio, des pli da pozicio li tenas en la Paalo de la Dioj. ⁶Li tiam uzas tiujn animojn por plifortigi siajn celojn. ⁷Do se vi fidele subtenas vian Dion, tiam li vin gardos kontraŭ la aliaj, sed se vi lin trompas, li vin pereigos. ⁸Tial vi devas fidele subteni lin, ĉar la ebleco de via renaskiĝo apartenas al li” ⁹Estas decidite, ke morgaŭ mi promesos min al Nutaso.

Saturday 11th of March

¹Post la matenmanĝo mi iris al mia sankta rivero, por fari la Di-agon de enmetado. ²La tuta afero vekis en mi la memorojn de mia infaneco, kaj precipe tiujn pri la gepatroj. ³Ili ofte legis al mi la malnovajn fabelojn, en kiuj ĉiam troviĝis malbonaj kaj danĝeraj sorĉistoj. ⁴Mi volas scii, ĉu oni vidas min tiel? ... ⁵Alveninte ĉe la rivero, mi malfermis la libron, kaj daŭrigis legadon de la Di-ago. ⁶Laŭ ĝi, mi unue devis krei fajron, do mi bruligis kelkajn lignojn ĝis ili fariĝis ruĝaj, el kio kreis la necesan teraĵon de fajro. ⁷Mi tiam pendigis la poŝhorloĝon

super ĝiaj flamoj tiel alte, ke ĝi ne rompiĝis, sed ne tro varmiĝis. ⁸Kiam ĝi sufiĉe varmiĝis, mi ĝin albrustigis kaj diris ⁹"Libere kaj vole mi oferas min al Nutaso, la Diino de la fajro, kaj al ŝi mi oferas la animon, kaj antaŭ ŝi mi ĵuras la jenon—¹⁰la homaron mi plibonigos, la postulojn mi plenigos, la kredon mi gardos, kaj kiel la Dioj mi fariĝos. ¹¹Per la energio de la vrilo fluanta tra tiuj ĉi teraĵoj kaj objektoj, mi eternigas mian promeson, ĝis miaj morto kaj renaskiĝo"

Sunday 12th of March

¹Post la leviĝo, mi lavis la vizaĝon kaj manojn, dirante la Di-agon de purigado ²"Per refreŝigado de la korpo, mi refreŝigas mian sanktan promeson" ³Tiam je la sunleviĝo mi iris al la preĝejo, ĉar demandojn pri mia manko mi ne deziras. ⁴Tie mi pasigis la tempon kalkulante kiom da belaj virinoj estas. ⁵Kvankam la plejmulto ja estis okulplaĉaj, tamen nur unu estis bela. ⁶Ŝi sidis antaŭ tri benkoj, kun longaj nigraj haroj senorde fluantaj laŭ la dorso. ⁷Jes ja, ŝi multe plaĉis al la okuloj. ⁸Mi ne povas forgesi la rideton de Lukeo, kiu interrompis mian rigardon, dirante, ke ŝi estas Mariano, la fratino de amiko, kiu loĝas ekstere de Saleo. Mariano.

Monday 13th of March

¹Hodiaŭ mi vizitis la magazenon de la ringotranĉisto por ke li entranĉu sur mia poŝhorloĝo la sigelon de Nutaso. ²Vidante la

tranĉotan sigelon, li demandis al mi pri ĝia signifo. ³Mi respondis, ke ĝi signifas ĉion bonan en la ĥina lingvo. ⁴Li akceptis tiun mensogon, kaj diris "Revenu al mi morgaŭ" ⁵Post la finiĝo de la labora tago, mi sidis en la malantaŭa korto, tralegante kelkajn paĝojn el la libro. ⁶Unu el tiuj priskribis la Kontombilajn nomojn, kaj prezentis la nomajn grupojn. ⁷Laŭ la libro, ĉiuj Kontombilaj nomoj apartenas al unu el du grupoj de graveco. ⁸La malgravaj nomoj apartenas al la infanoj, kaj la gravaj al la homoj maturaj.

Tuesday 14th of March

¹La dekkvina parolado de Vajeso priskribas la teraĵojn ²"La Kontombiloj montris al mi la kapablojn de la Dioj, laŭ ili, la Mastro de ĉio malpermesis al la Dioj eniri nian ekziston, ³sed la Mastro kapabligis la Diojn superregi niajn teraĵojn, ⁴tial se deziras mi paroli al Etipujo, mi unue bezonas krei la teraĵon de polvo, ĉar polvo estas la teraĵo de Etipujo" ⁵Tio klarigas al mi multon; do alvokante Nutason, mi unue devas krei fajron, ĉar la fajro ligos min al ŝi. ⁶Ankaŭ sur la sama paĝo mi trovis kanton pri morto, kiun oni devas kanti antaŭvidante la morton. ⁷"Dank' al la gepatroj, la gefratoj, kaj ĉiuj amikoj. ⁸Alveninta la tempon, do plilaŭtigu la muzikon, kaj komencu la dancadon, ĉar en la oreloj vokas la Dioj. ⁹Do dancu sentime, por iros mi for al la granda Paalo, de kie mi renaskiĝos" ¹⁰Pardonu min pro la modesta traduko.

Wednesday 15th of March

¹Hodiaŭ matene antaŭ la laboro, mi kolektis mian poŝhorloĝon de la ringotranĉisto, kiu faris sian laboron tute senerare. ²Tiam post la vespermanĝo, mi komencis traduki parton de la libro pri morto. ³Jen la dekoka parolado de Vajeso ⁴"Je la morto, la animo revenas al la Paalo de la Dioj, kie la Diaro juĝos ĝin. ⁵Se la animo subtenis sian Dion fidele, kaj plenigis la postulojn laŭ ebleco, la Dioj redonos ĝin al la homaro, ⁶kaj se la animo estis aparte fidela, ĝi revenos al la sango de kiu ĝi apartiĝis. ⁷Tamen se la animo neniam aŭdis pri la vereco de la Dioj, tiam ĝi estos juĝita laŭ ĝiaj vivaj agoj. ⁸Tial estu zorgeme, ĉar en la Paalo de la Dioj ekzistas nur du vojebloj—Detruo aŭ renaskiĝo" ⁹Nun la gravecon de la postuloj mi scias.

Thursday 16th of March

¹En tiu ĉi parto de la libro, mi trovis kelkajn Diagojn pri morto, sed ankaŭ unu pri naskiĝo. ²Eble oni metis ĝin tie pro la proksima interrilato de naskiĝo kaj morto. ³Jen la dudek unua parolado de Carjata ⁴"Ekzamenante la murojn de la nova Paalo, mi renkontis gravedan virinon. ⁵Mi demandis ŝin pri kiam ŝi naskos sian infanon. ⁶Ŝi respondis je mi ĝentile, ke laŭ ŝia kalkulo, nur du lunoj restas. ⁷"Ĉu vi jam alvokis la Diojn por helpo?" mi aldonis. ⁸Ŝi balancis la kapon, ĉar neniu instruis al ŝi la necesecon de tiu Di-ago ⁹"Parolu tiujn vortojn" mi diris "sed anstataŭ uzu la teraĵon

de via dio" tiam ni komencis voki ¹⁰"Vin mi alvokas la Dio de la polvo, kaj ĉiujn aliajn potencajn Diojn. ¹¹Je viaj nomoj mi proklamas la jenon; Mi fidele kondukos tiun infanon al la vereco de la Dioj, laŭ la postuloj de la Dioj. ¹²Mi petas, ke vi havigu al li nur plenan kaj sanan animon, kaj mi promesos lian fidelecon"

Friday 17th of March

¹Hodiaŭ komenciĝis terure, Lukeo trovis min dum la Di-ago de demandado. ²Li tuj kulpigis min pri sorĉado, kaj kiam mi penis klarigi al li, ke sorĉadon li ne vidis, ³li perdiĝis en sia kolero, prenis mian libron, kaj tiam ĵetis ĝin el la pordo. ⁴Mi ne atendis pli, mi prenis la sakon kaj flugis el la pordo post ĝi. ⁵Nun mi sidas en la Ŝamroka hotelo, pensante pri tio okazinta. ⁶Mi esperas, ke ĉio morgaŭ revenos al ordo.

Saturday 18th of March

¹Reveninte al la domo de Lukeo, mi trovis miajn posedaĵojn ĉe la malantaŭa pordo. ²Ne sciante, kion fari, mi kolektis miajn sakojn kaj iris al proksima hotelo. ³Poste mi revizitis la domon de Lukeo, ĉar mi deziris pacigi kun li. ⁴Tamen vidinte min, li elprenis sian pafilon, kaj turnis ĝin kontraŭ mi!

⁵Antaŭ horo Lukeo kaj lia amiko laŭte trapuŝis sin tra mia pordo. ⁶Timigite, mi senpense eksaltis el la fenestro, tranĉante la piedon dum la falo. ⁷Nun mi kuŝas apud mia rivero, tima, laca, kaj malsata, dum

diablaj flugaĵoj konstante min atakas. ⁸Ankaŭ
sonoj elvenantaj el la arboj timigas min. Ĉu
viandmanĝaj bestoj loĝas tie ĉi?

Sunday 19th of March

¹Mi pensas, ke la kapo perdiĝadas al mi, hieraŭ
nokte mi vekigis al bluaj flugantaj lumaĵoj, kiuj
moviĝis tra la aero, kiel fantomoj rampantaj tra la
arbaro. ²Mi ektimis, kaj deziris kuri, sed antaŭ ol
mi povis moviĝi, la lumoj subite kolektiĝis en la
formon de mia mortinta patro, kaj ekparolis tiujn
ĉi neforgeseblajn vortojn ³"Ni estas la
Kontombiloj, Nutaso la Diino de la fajro nin
sendis al vi kun tiu ĉi ordono—⁴Revenu al Saleo.
Tie vi semos la duan semon, kiun la tria elkreskos,
se vi malplenigos tiun ordonon, la Dioj detruos la
mondon" ⁵tiam ili subite malaperis. Kion mi vidis?
ĉu mi deliris? ĉu mi songis? Sed tio ne povas, ĉar
la tranĉvundo rapide saniĝis.

Monday 20th of March

¹Mi sentis min en danĝero, tial kontraŭ la ordonoj
de la Kontombiloj, mi marŝadis ses horojn al
Rozdalo. ²Nun mi kuŝas dormeme en la Rozdala
Hotelo, sed mia veka kapo ne permesis al mi
dormi, ĉar la ordonoj de la Kontombiloj naĝas en
la kapo. ³Tamen mankas al mi la devota kuraĝo
por plenigi tiujn ordonojn. ⁴Mi povas antaŭaŭdi
viajn insultojn ⁵"Kia flava hundo vi estas, revenu,
malkuraĝulo!" sed kiu permesis al vi juĝi min, ĉu vi
estis tie? ⁶ĉu vi travivis tion, kion mi ja travivis!—

eble vi iel pravas, do kion fari? ĉu mi forgesu la ordonojn de la Kontombiloj, kaj do forviŝu la memorojn de la okuloj? ⁷Mi bezonas ian respondon! Gvidu min laŭ la bonan vojon, mi petas!

Tuesday 21st of March

¹Mi renkontis grupon da paŝtistoj, kiuj hodiaŭ nokte kondukos sescent bovojn al la Marponto de Alberto, tiam Hobarto. ²Mi tre volas akompani ilin, sed la Dioj jam donis al mi siajn ordonojn. Tial mi pli enprofundiĝis en la libro por trovi gvidadon. ³La deknaŭa parolado de Vajeso kuraĝigis min ⁴“Via vivo ne finiĝos je la morto, ĉar morto estas nur la posta branĉo de la dia arbo, do timi la morton estas timi la nokton, ĉar tiel certe kiel la suno releviĝos, la kredantoj renaskiĝos. ⁵Tial ridetu, ne ploru, danku la gepatrojn, kaj la gefratojn, tiam preparu vin, ĉar atendas la Paalo de la Dioj” ⁶Tiu ĉi parolado inspiris al mi kontraŭstari Lukeon, tial morgaŭ mi revenos al Saleo—Nutaso min gardu.

Wednesday 22nd of March

¹Apenaŭ semajno jam pasis, de post Saleon mi forlasis, sed mia timo de ĝi neniel malfortiĝis. ²Alveninte al la urbo, mi revenis al la domo de Lukeo, kie mi trovis lin kaj unu alian sidantaj korte. ³Vidinte min, li leviĝis kaj iris rekte renkonte al mi. ⁴Mi memoras, ke ju pli proksime li fariĝis, des pli rapidiĝis la koro, ĝis fine mi povis flari lian

spiron. ⁵Tiam neatendite li demandis al mi sincere, ĉu la Dioj lin malbenis, ĉu lin mortigos la Dioj. ⁶Mi tiam vidis sur lia nigra mano la sigelon de Nutaso. ⁷Ial mi decidis ekteni lian bruligitan manon, kaj diri ⁸"Ne pardonpetu min, sed Nutason kaj la aliajn Diojn, ĉar ilin vi ja ofendis"
⁹Ĝis nun mi ne scias, kial mi tion diris.

Thursday 23rd of March

¹Lukeo rehavigis al mi sian ĉambron, kaj eĉ konvinkis la hotelestron redoni al mi laboron. ²Tagmeze mi rakontis al Lukeo kaj lia amiko pri la Dioj. ³Interese, lia amiko demandis min pri io, kion mi antaŭe ne pripensis "Kial ekzistas Sireo, la neinvitita Dio?" ⁴Mi ne sciis la respondon, do mi turnis min al la libro. ⁵Tie mi eltrovis, ke Sireo estis la sola Dio, ne ordonita al nia stelejaro. ⁶Ial li ne kapablas superregi niajn teraĵojn. ⁷Vere, liaj estado kaj trompado ondigos la politikan firmecon de nia stelejaro, kaj fakte penante eniri la Paalon de la Dioj, li faligis la Dion Tulpo. ⁸La aliaj Dioj do kolektiĝis potence por bari lin de la Paalo. ⁹Nun li naĝas inter la steloj, serĉante novan enirejon.

Friday 24th – Saturday 25th of March

¹La situacio inter mi kaj Lukeo komencis pliboniĝi. ²Sed mi ne estas tiel naiva kredi, ke liaj okuloj subite malfermiĝas, nur pro la sigelo sur lia bruligita mano. ³Ankaŭ hodiaŭ mi eltrovis, tradukante la sepan paroladon de Vajeso, kial

Tulpo falis pro Sireo ⁴“La vizaĝon mi ne povas memori, sed la demandon mi neniam forgesos. Ĝi venis de knabineto ludanta sub arbo ⁵“Kial malpermesas al mi elekti Sireon?” ŝi diris tute senkulpe. ⁶“Sidigu hundino” mi respondis “Ĉar mi havas rakonton por vi; ⁷Antaŭ longa tempo, Tulpo kaj Sireo interkonsentis subteni unu la alian politike. ⁸La ideo estis simpla, Tulpo helpus Sireon eniri en la Paalon de la Dioj. ⁹Interŝange Sireo devigus la animojn de nia ekzisto preĝi al Tulpo. ¹⁰Tamen ĉiuj scias, ke nur dek du Dioj povas ekzisti kune en la granda Paalo. ¹¹Tial la du Dioj ankaŭ konsentis elpeli Sunevon el la Paalo. ¹²Ĉar ŝi estas la plej potenca el la eksteraj Dioj, kaj sen ŝi, Sireo povas preni ŝian pozicion, dum Tulpo povas fariĝi pli grava. ¹³Sed Etipujo eltrovis tiun planon, kaj kolere mortigis duonon de la kredantoj de Tulpo. ¹⁴Pro tio, Tulpo politike falis, dum Sunevo politike fariĝis pli grava. ¹⁵Jen kial malpermesas al vi elekti Sireon”

Sunday 26th of March

¹Hieraŭ nokte mi songis pri tiu domo kun la rompita tegmento. ²Sed en tiu ĉi songo kuŝis ĉie ĉirkaŭ la domo korpoj de kaleŝoj sennombraj kaj bruligitaj, ³ili estis tiom multnombraj, ke la fumo levigantaj kaŝis la sunon. ⁴Tiam la tero komencis tremegi, ĉar el ĝi ekleviĝis altaj konstruaĵoj, kiuj ĵetis sin ĉielen—⁵kaj sur ĉiuj flankoj brilis la numero dekdu. ⁶Mia rigardo akompanis tiujn konstruaĵojn, ĝis ili malaperis en la nuboj. ⁷Tio

vekis en mi deziron por vojaĝi kun ili, por atingi la ĉielon, sed tiam mi vekigis. ⁸La signifo de tiu sonĝo ankoraŭ sin kaŝas de mi; mi trovis nenion pri ĝi en la libro, kaj nenio en mia vivo rilatas al ĝi. ⁹Jes estas interesa mistero.

Monday 27th of March

¹Mi komencis instrui al Lukeo pri la diversaj ecoj, kaj la maniero, kiun oni uzas elekti sian Dion. ²Sed poste mi komencis pripensi, ĉu aliaj devas elekti siajn Diojn kiel mi. ³Do mi komencis traserĉi la libron, el kiu mi trovis la kvardek kvaran paroladon de Ostuo ⁴“Tulpo kaj Sereco apartenas al la faruloj, Nutaso kaj Ekamekamo al la pensuloj, Tigano kaj Traeo al la kreuloj, Sramo kaj Emuaho al la helpuloj, Etipujo kaj Rukremo al la konvinkuloj, kaj laste Enupeno kaj Sunevo al la stariguloj. ⁵Elektante Dion, vi elektu laŭ via precipa eco, ĉar miaj provoj montris, ke homoj kiuj elektis laŭ siaj ecoj, pli bone unuigis kun siaj Dioj, ol homoj kiuj elektis nur laŭ la kor’”. ⁶Tamen tiu ĉi sistemo ne estas senerara, ĉar ĝi estas kreo de miaj propraj observoj. ⁷Vi uzu ĝin kiel nur helpilon, kaj memoru, ke vi unue elektu de la koro, kaj poste kontrolu la sistemon.

Tuesday 28th of March

¹Lukeo petis, ke mi traduku la tutan libron por li. ²Ĉar li mem deziras legi ĝin, kaj tiel pli bone kompreni la Diojn. ³Mi diris al li, ke mi pripensos ĝin, sed ekzistas kelkaj gravaj malfaciloj, kiuj devas

unue esti klarigitaj. ⁴Ekzemple la hispana traduko ofte estas manka, rompita, aŭ tute nekomprenebla.

Wednesday 29th – Friday 31st of March

¹Traserçante la libron mi malfermis paĝon, kiu priskribas la politikon de la Sibiano. ²Jen la dudek kvara parolado de Carjata ³“Pro la ne antaŭvidita morto de Vajeso kaj mortigo de Rotoŝo, la Dioj ordonis al mi ke ni starigu novan sistemon de regado; ⁴Vi ĉiuj efektivigos la Popolan Paalon, kaj la pli potenca Regantan Paalon. ⁵En la Reganta Paalo, troviĝos nur tri homoj—⁶scimanĝisto, militludisto, kaj subtenisto, kiuj estos arbitre elektataj po ses lunoj. ⁷Se vi elektiĝos, tiam via alspiritparolisto tuj irigos vin al la servoloko, sed se vi posedus la jenajn ecojn, via elektiĝo fariĝos neebla; ⁸Tiuj elektitoj, kiuj havas infanon malpli du jaroj aĝe, aŭ naskos infanon en la jaro. ⁹Tiuj elektitoj, kiujn la politikistaro punis, kaj tiuj elektitoj, kiuj jam laboris en la politikistaro, aŭ havas kapon difektitan. ¹⁰Dum via tempo en la Reganta Paalo, vi partoprenos en semajnaj kuniĝoj kun la aliaj du elektitoj, en kio vi preparolos la proponitajn regulojn de la Popola Paalo. ¹¹Poste vi interkonsente elektos tiujn regulojn, kiuj plaĉas al vi. ¹²Sed memoru, ke ekstere de tiuj kuniĝoj, malpermesas al vi paroli kun la aliaj elektitoj, esceptinte se via elekto jam finiĝis. ¹³Se vi rompus tiun lastan regulon, la Dioj pereigos vian animon je via reveno al la granda Paalo. ¹⁴En la Popola Paalo ankaŭ troviĝos la tri grupoj, sed malsimile al

la Reganta Paalo; la Popola Paalo estos elektitaj po tridek ses lunoj. ¹⁵Laŭ la reguloj de siaj triboj, kaj per komuna interkonsento, ili estos elektitaj, ¹⁶sed neniu elektito estos permesite plenigi la devojn de sia servoloko, dum pli ol tridek ses lunoj seninterrompe”

April

Saturday 1st of April

¹Mi volis eltrovi kiel oni fariĝis militludisto, subtenisto aŭ scimanĝisto, tial denove mi traserĉis la libron. ²Jen kion mi trovis, la dudek kvina parolado de Carjata ³"Kiam infano atingas cent sesdek ok lunojn, kaj plenigas la Di-agon de matureco, tiam li havas la rajton nomi sin maturulo. ⁴Post la maturiĝa festo li bezonas elektisian vojon en la vivo; militludisto, subtenisto, scimanĝisto, aŭ alspiritparolisto. ⁵Se li elektas militludiston, li devas lerni pri la diversaj batalaj artoj, por fariĝi defendisto kaj atakisto de la religio. ⁶Se li elektas subteniston, li devas lerni pri la diversaj subtenaj artoj, por fariĝi semisto, aŭ konstruisto de la religio. ⁷Se li elektas scimanĝiston, li devas lerni pri la diversaj pensaj artoj, por fariĝi observisto aŭ instruisto de la religio" ⁸Mi trovis nenion pri kion alspiritparolisto devas lerni kaj fari. ⁹P.S. Bonan novaĵon, Sinjorino Murfio, laboranta ĉe la Ŝamroka Hotelo naskis filon!

Sunday 2nd of April

¹Mi, Lukeo, kaj Konolio vojaĝis al Hejfildo por vidi la Paskajn Ĉevalkuradojn. ²Kvankam la tago estis iom varme, la okazoj okupis nin. ³Tiam post la finiĝo de ĉevalkuradoj vojaĝante saleon, mi rememoris, ke la poŝhorloĝon mi senintence lasis

en la banejo. ⁴Mi tuj revenis, kie laŭdata estu Nutaso, mi retrovis ĝin. ⁵Mi estas necerta, pri kion mi farus, se mi ĝin vere perdus. ⁶Do kiam mi havos la tempon, mi tion eltrovos.

Monday 3rd of April

¹Pli frue Lukeo kaj mi persekutis kangaruaron laŭ rivera bordo, kaj post iom da tempo ni kaptis ilin ĉe rivera forko. ²Ili ensaltis la riveron kaj komencis naĝi al la alia bordo. ³Mi celis mian pafilon al unu blanka kangaruo, kiun ni jam nomis froston, kun la intenco mortpafi ĝin. ⁴Sed ĉiam penante pafi ĝin, maljuna griza kangaruo metis sin inter ni. ⁵Estis stranga sento, ĉar kelkajn fojojn mi moviĝis por pafi froston, kaj ĉiun fojon tiu maljuna kangaruo antaŭmetis sin. ⁶Li staris rekte antaŭ la pafilo sen zorgo pri sia vivo. ⁷La obstineco kaj kuraĝo de tiu kangaruo venkis nin, ĉar kaj Lukeo kaj mi ne povis mortpafi ilin. ⁸Tio rememorigis min pri la spirito de nia propra religio, kiu instruas ⁹"Timi la morton estas timi la nokton"

Tuesday 4th of April

¹Mi volis eltrovi tion, kio okazus se mi perdus mian sanktan objekton. ²Laŭ la libro, se vi perdas la sanktan objekton, vi invitos al vi sorton malbonan, almenaŭ ĝis vi ĝin retrovos. ³Tamen vi povas ankaŭ anstataŭigi ĝin per nova objekto, se ĝi vere perdiĝas. ⁴Por anstataŭigi ĝin, vi devas elekti novan sanktan objekton, kaj reveni al via sankta loko, kaj plenigi la Di-agon de detruo. ⁵Ĉar sen via

sankta objekto, vi perdas la kapablon paroli al la dioj. ⁶La kvardek sesa parolado ankaŭ diras pri tio ⁷“Vi devas gardi zorgeme vian sanktan objekton, ĉar se iu trovas ĝin, li povas peti al sia Dio; ataku, influu, aŭ detruu la kreanton de tiu ĉi objekto. ⁸Detranĉu lian vrilon, kaj pereigu lin de la mondo”

Wednesday 5th of April

¹Hodiaŭ mi lernis fari la Di-agon de detruo. ²Laŭ la libro, vi devas reveni al via sankta loko kun nova objekto sanktigota. ³Tie vi devas rekrei vian teraĵon same kiel la originala promeso. ⁴Kvankam se via sankta loko ankoraŭ ne ekzistas, tiam permesas al vi elekti novan, tamen mi ankoraŭ ne diris la plej doloran parton; ⁵Vi devas ŝmiri la supraĵon de via tranĉilo per via varma sango, parolante tiujn vortojn ⁶“Mi alvokas vin Nutaso Diino de fajro, ke vi kompatu kaj indulgu min, ĉar nian plej sanktan objekton mi perdis. ⁷Tial mi revenis al tiu ĉi loko kun nova objekto, kiun mi esperas, ke plaĉos al vi por ke mi povas reatesti mian sanktan promeson, ĝis miaj morto kaj renaskiĝo” ⁸Eĉ se vi ne perdis vian objekton, la libro diras, ke vi anoncu ĝin perdita, ĉar ŝtelita aŭ detruita objekto povas kolerigi vian Dion.

Thursday 6th of April

¹Hodiaŭ estis tre longa tago, post labori mi plezurigis min per legado de la libro, *Of High Degree*, kiu estis interesa verko. ²Ankaŭ mi pensis iom pri la Kontombilo... ĉar mi estis necerta, ĉu ili

vere ekzistis, aŭ ĉu mi simple songis ilin. ³Kelkajn fojojn mi trarigardis la libron, sed trovis malmulton pri ili.

Friday 7th of April

¹Pli frue hodiaŭ iu diris ion pri festotagoj. ²Tio pensigis min pri kiaj festotagoj ekzistas en mia religio. ³Do post labori, mi traserĉis la libron, kaj trovis nur unu aludon pri festotagoj. ⁴Ĝi troviĝis en la kvardek oka parolado de Ostuo ⁵“Ni okazigos batalistan semajnon, semajno plena je sango kaj la militaj artoj. ⁶Kie niaj plej bonaj militludistoj honoros sian genton en la kampo de milito. ⁷Po tri militludistoj el ĉiu tribo kuniĝos kaj batalos kontraŭ unu la alian. ⁸Ili uzos ĉiajn eblojn por venki siajn malamikojn. ⁹Sed permesas al neniuj mortigi, ĉar la celo estas faligi siajn malamikojn per prudenta pensado, kaj tiuj ankoraŭ starantaj je la fino, gajnos la ludon” ¹⁰Mi tre volus vidi tiun okazon, se vere neniuj mortus.

Saturday 8th of April

¹Mi tiel multe legis la titolojn militludisto, subtenisto, kaj scimanĝisto, ke mi komencis demandi al mi pri kian signifon ili havas. ²Mi jam scias, ke ĉiu infano devas elekti unu el tiuj titoloj, pleniginte la Di-agon de matureco. ³Sed mi ne sciis, ke unu parto el la Di-ago bezonas, ke li plenu ekzamenon pri tiuj titoloj, ⁴kaj mi ne sciis, ke lian ekzamenon la Popola Paalo kontrolas. ⁵Ankaŭ mi ne sciis ke por fariĝi maturulo, li devas

plenigi tiun ekzamenon. ⁶Ĉar li ne povas elekti gravan kontombilan nomon, aŭ fariĝi studento de sanktaj titoloj, sen pleniginte ĝin.

Sunday 9th of April

¹Mi trovis malmulton pri kiel homo povas fariĝi militludisto, subtenisto, aŭ scimanĝisto, se li naskiĝis al nekredanta familio. ²Tamen unu frazo diras “Li devas plenigi la Di-agon de oferado” Mi supozas, ke mi restos sentitola... ³Parolinte al la Nutaso, mi gajnis la senton, ke mi devas legi la libron pli.

Monday 10th of April

¹Mi pripensadis pri kiaj religiaj tradicioj ekzistas en mia religio, ²do mi rekomencis tralegi la jam legitajn paĝojn. ³Tie mi trovis la jenan pri la alspiritparolisto. ⁴Ili estis konsiderataj kiel la gardistoj kaj gvidistoj de la religio kaj popolo. ⁵Sed post la morto de la dua grava alspiritparolisto Carjata, ili perdis la rajton superregi la popolon, ⁶tamen ankoraŭ posedis la rajton forĵeti tiujn leĝojn kontraŭ la diaj postuloj. ⁷Mi sentas, ke mi trovis mian propran vojon en la vivo.

Tuesday 11th – Wednesday 12th of April

¹Hodiaŭ mi tradukis la kvardek trian paroladon de Ostuo, kiu priskribas la monsystemon de la sibiano ²“Tial estas per granda bedaŭro, ke hodiaŭ mi devas anonci la ĉesigon de la Popola kaj Reganta Paaloj, ĝis ni povas forigi la malpurulojn. ³La dioj

donis al mi la jenan postulon – ⁴Malpermesas al vi havigi ŝelon al tiuj, kiuj promesas al vi du ŝelojn en ŝuldo. ⁵Esceptinte se vi plenigas la jenajn regulojn; La ŝuldanto de viaj ŝeloj devas unue doni al vi po unu ŝelo por ĉiu deko da ŝeloj deziritaj, ⁶nur kiam vi ricevas tiun ŝelon, estas permesite havigi al li la aliajn naŭ ŝelojn. ⁷Li devas redoni al vi ĉiujn naŭ ŝelojn en tempo, kiun vi ambaŭ konsentis. ⁸Tute malpermesas al vi postuli aldonajn ŝelojn esceptinte tiujn jam preparolitajn. ⁹Se la ŝuldanto ne povas redoni ĉiujn naŭ ŝelojn en tempo, kiun vi ambaŭ konsentis, tiam la Reformita Popola Paalo punos lin. ¹⁰La punoj komenciĝas je publika vipado por malgrandaj nombroj, kaj finiĝas je morto por grandaj nombroj. ¹¹Se vi—la donanto petas pli ol la jam preparolitajn regulojn, tiam vi invitos morton de la Reformita Popola Paalo." ¹²Feliĉe mi ne havas deziron preni prunte monon de la bankoj.

Thursday 13th of April

¹Mi eltrovis novan postulon en la kvardek kvina parolado de Ostuo ²“Permesas al vi partopreni en ludoj de sorto, tamen malpermesas al vi interŝanĝi ŝuldojn, esceptinte vian fierecon” ³Tiu ĉi postulo plaĉas al la oreloj, ĉar mia patro perdis mian heredaĵon en ludoj de sorto. ⁴Ankaŭ la jena postulo plaĉas al mi ⁵“Nur la militludistoj kaj subtenistoj estas permesite trinki drinkaĵojn, sed eĉ ili devas ĉesigi la drinkadon antaŭ ol la komenco de bataloj. ⁶La scimangistoj kaj alspiritparolistoj

ĉiam estas malpermesite trinki drinkaĵojn, ĉar drinkaĵoj difektas la memoron”⁷ Mi estas necerta, pri kion Lukeo diros, aŭdante tion.

Friday 14th of April

¹Hodiaŭ mi vidis Marianon en la urbo, tio pensigas min pri kiel homoj en mia religio starigas sekajn interrilatojn. ²Kion mi poste trovis en la libro, estas tute neebila en nia tempo. ³Jen la dudek sesa parolado de Carjata “Ĉiu knabo restos virga ĝis li fariĝas maturulo, ĉar li ankoraŭ ne atingis la aĝon de matureco. ⁴Sed post la aĝo de matureco ĝis tricent lunoj de aĝo, permesas al li koni aliajn libere kaj laŭplaĉe. ⁵Tamen je la aĝo de tricent lunoj, li devas trovi vivkunulon, kaj poste naskigi tiom da infanoj devigataj de la Popola Paalo. ⁶Laŭ la gvidado de la amrondo li devas elekti.

Saturday 15th—Sunday 16th of April

¹La kvardek naŭa parolado de Esuo, la scimanĝisto diras ²“Kiam ni deziras starigi domon, ni devas elserĉi personon de niaj propraj kredo kaj titolo. ³Ĉar infanoj naskigitaj al domoj malsimilaj, perdiĝos sur la Dia vojo. ⁴Sed permesas al vi elekti personon de vojo nekonata, se ne troveblas persono simila. ⁵Tamen ankaŭ tempo montris, ke ni ĉasu personon de eco malsimila, ĉar ecoj similaj ofte disputas kaj apartiĝas. ⁶Tial vi devas esti honesta kaj malferma pri via vera eco, aŭ vi perdiĝos en malfeliĉeco. ⁷Se vi jam trovis taŭgan personon, tiam vi devas demandi al vi mem—⁸Ĉu

tiu ĉi persono estos la plej bona amiko, kaj ĉu li plenigos ĉiujn miajn dezirojn, de ne nur la haŭto, sed ankaŭ la animo. ⁹Ĉiuj el tiuj demandoj vi devas pripensi, antaŭ ol estas permesite unuhaŭtiĝi”

Monday 17th of April

¹Estas preskaŭ dek tagoj de post kiam Lukeo foriris al la marponto de Alberto. ²Mi esperas, ke nenia malfeliĉo renkontis lin sur la vojo. ³Pli frue hodiaŭ Pastro Lindzo renkontis min ĉe la frukta magazeno, kaj li min demandis pri mia manko ĉe la preĝejo. ⁴Mi estis necerta, pri kion mi devas diri, tial respondis, ke mi estis okupata. ⁵Li tuj respondis parolade. Ĉu la Savinto estis okupata, mortante sur la kruco pro niaj pekoj, kaj ĉu mi ne deziras almenaŭ danki lin pro tio. . . ⁶Jes Pastro Lindzo, mi volas danki lin pro via granda. . .

Tuesday 18th of April

¹Hieraŭ nokte mi deziris paroli al Nutaso pri kiaj estas la unua kaj dua semoj, sed je miaj demandoj ŝi ne respondis. ²Tiam poste, mi komencis traduki la deksekan paroladon de Vajeso ³"La vrilo estas kaj nia ligo al la Dioj, kaj ankaŭ la konscio de la animo, sen ĝi la korpo estas ne pli ol senviva sako de sango. ⁴Tamen kompreno de ĝi estas ne sufiĉa, se mankas al ni ankaŭ kompreno de la teraĵoj kaj sanktaj objektoj. ⁵Tial estas super ĉio grave, ke ni rigardu la vrilon, teraĵojn kaj sanktajn objektojn egale gravaj, aŭ ni malsukcesos kompreni la Diojn”

Wednesday 19th of April

¹Tradukante la dudek paroladon de Carjata, mi eltrovis ke la Dioj estis distingataj laŭ liaj vireco aŭ virineco. ²La Dioj mem ne vere posedas tiajn karakterojn, tamen la Sibiano uzadis ilin por homigi la Diojn. ³“La viraj Dioj estas Tulpo, Ekamekamo, Sramo, Etipujo, Rukremo, kaj Eनुpeno. ⁴La virinaj Dioj estas Sereco, Nutaso, Tigano, Traeo, Emuaho, kaj Sunevo” ⁵Mi opinias, ke tiu sistemo helpas ankaŭ al mi, do mi daŭrigos ĝian uzon.

Thursday 20th of April

¹Hodiaŭ tradukante paroladon de Esuo, mi renkontis la plej teruran ideon, kiun mi iam legis. ²Fakte ĝi kaŭzis al mi tiom da honto tradukante, ke mi preskaŭ elĵetis la rezultatojn. ³Sed tion mi ne faris, ĉar mi sentis min iel devigita konservi ĝin. ⁴“Esuo kaj Ostuo proklamis publike, ke estas al la Sodomistoj permesite unuhaŭtiĝi libere kaj sentime! ⁵Sed ankaŭ Ostuo diris poste, ke la Dioj malpermesis al la Sodomistoj infanojn” ⁶Infanojn, kian signifon tio havas?! Ĉu al Sodomistoj estas malpermesite naski infanojn, aŭ ĉu ili simple ne rajtas apudesti infanojn? ⁷Des pli konfuze li aldonis, ke la Sodomistoj havas malpuran sangon? ⁸La kapo min tre doloras. ⁹Tamen vere ne gravas la signifo, ĉar mi neniam akceptos tiajn homojn, neniam.

Friday 21st of April

¹Granda fajro komencis bruli en unu el la domoj sur mia strato. ²Mi kaj tri aliaj penis estingi la flamojn, sed ĝi montriĝis tro forta, kaj forbrulis preskaŭ la tutan domon. ³Mi kompatas la posedanton, eĉ pli pro la malbona kapitala situacio.

Saturday 22nd of April

Unwritten Entry.

Sunday 23rd of April

¹Hodiaŭ matene mi iris al la preĝejo por trankviligi la pastron, kiu konstante atakas min pri mia manko, sed ankaŭ por renkonti Marianon. ²Mi sukcesis komenci interparoladon kun ŝi, sed nur mallongan ĉar mi ne volis fariĝi enuiga. ³Tiu renkonto pensigis min, pri kiel mia religio rigardas tiajn interrilatojn. ⁴Tiam mi trovis min pensanta pri ŝia nuda kaj matura brusto, kaj kvankam mi jam longe ne estas Kristano, la kutimoj de tiu religio ankoraŭ tenas min.

Monday 24th – Tuesday 25th of April

¹Lukeo proponis, ke mi vizitu kun li la Barajn Produktaĵajn Kampojn. ²Li opinias, ke mi tro multe legas pri la mondo, anstataŭ ĝoji ĝin. ³Ankaŭ li volas, ke mi konsideru komenci magazenon kun li, sed vere ankaŭ tiu ideo ne interesas min. ⁴Mi deziras ne pli ol, sidi kun ĝlaso da kafo kaj legi novan libron. ⁵Jen interesa parolado, kion mi tradukis hodiaŭ ⁶“Ekzistas kvar sanktaj teraĵoj. En

la kapo ni trovas la fajron de Tigano, Nutaso, kaj Sramo. ⁷En la spiro ni trovas la venton de Ekamekamo, Traeo, kaj Sunevo. ⁸En la sango ni trovas la akvon de Enupeno, Rukremo, kaj Sereco. ⁹Kaj en la haŭto ni trovas la polvon de Etipujo, Emuaho, kaj Tulpo. ¹⁰Tiuj ĉi kvar teraĵoj kaj la vrilo faras vivon.”

Wednesday 26th – Thursday 27th of April

¹Trale tante la libron, mi trovis paroladon de sennoma militludisto. ²Tio kaptis la atenton, ĉar mi neniam legis paroladon el tia grupo—³Jen la kvindek kvina parolado "Preparu vin, ĉar la orientlaŭduloj aliras nin. ⁴Ili aliras por bruligi niajn vilaĝojn, por mortigi niajn gefratojn, kaj ŝteli niajn virinojn. ⁵Tiuj viroj de la sanga reĝo marŝigas sian sklavaron kontraŭ ni, sed ili forgesis. ⁶Tute forgesis, ke ni estas la militludistoj, la elektitoj de la veraj Dioj. ⁷Kaj kvankam la jaroj malfortigas nian haŭton kaj malgrandigas nian nombron, niaj spiritoj restas fortaj! ⁸Kaj se morto estos nia sorto, tiam ni feliĉe akceptos ĝin, ĉar nur ni renaskiĝos!

Friday 28th of April

¹Mi ankoraŭ ne aŭdis de Luiso, kaj mi komencis dubi, ĉu mia letero atingis lin. ²Unu el la Fratinoj de Siono pli frue vizitis la hotelon, kaj mi komencis francan interparolon kun ŝi. ³Poste mi priparolis Esperanton kaj ĝiajn meritojn, ŝi ŝajnis vere interesata, precipe kiam mi subdiris la hebrean fonton de Zamenhof. ⁴Ŝi proponis, ke mi

donu al ŝi prunte lernolibrojn. ⁵Tamen mi ne havas tiajn librojn dum longa tempo.

Saturday 29th – Sunday 30th of April

¹Traserĉante la libron por klarigo pri la fonto de la sibiano, mi renkontis interesan paroladon de Carjata. ²Tiu ĉi parolado, la dudek sepa, priparolas la regulojn de unuhaŭtiĝo. ³"La Dioj malpermesas al vi unuhaŭtiĝi al sangaj parencoj, ĉar infanoj naskigitaj de tiaj gepatroj malfortigos la genton. ⁴Tial estu sciate al vi ĉiuj, ke neniuj havas la permeson unuhaŭtiĝi al siaj gefiloj, gepatroj, geonkloj, geavoj, aŭ gekuzoj" ⁵Tiu regulo estas komprenebla, tamen la sekvantaj frazoj haltigis min ⁶"Ankaŭ la Dioj malpermesas al vi homojn, posedantajn la jenajn karakterajn ecojn—⁷homoj de malpura sango, homoj ne amataj, bestoj, senvivaj objektoj, Dioj, aŭ homoj, kiuj ne kredas al la Dioj. ⁸Tamen estas al vi permesite unuhaŭtiĝi al nekredantoj, se la unuhaŭtiĝo plifortigos la kredon, aŭ kredantoj ne estas troveblaj" ⁹Traleĝante ĝin mi pli kaj pli maltrankviliĝis, ĝis mi legis la finan frazon ¹⁰"kredantoj ne estas troveblaj" ĉar mi unue pensis, ke mi ĉiam estus sola.

May

Monday 1st – Wednesday 3rd of May

¹Jen la kvindeka parolado de la scimanĝisto Esuo, kiu starigas la unuhaŭtigajn kutimojn de la Sibiano. ²La parolado en la ĝia tuto plaĉas al mi, tial mi transskribis ĝin al tie ĉi. ³“Venos al ni ĉiuj tempo, kiam ni deziras de alia ne nur lian haŭton sed ankaŭ animon. ⁴Kiel do ni agu en tiaj situacioj? ⁵Ĉu ni plenigu la kutimojn malnovajn, aŭ ĉu ni konduku nin kiel sovaĝaj bestoj? ⁶Tiam la Dioj havigis al mi la Di-agon de ĉasado. ⁷La reguloj estas simplaj; Permesas al vi ĉasi ĉiujn homojn esceptinte tiujn jam unuhaŭtigintaj aŭ ĉasataj. ⁸Sed kompreneble vi ne ĉasu kontraŭ la reguloj de unuhaŭtigo. ⁹Se post ĉio ĉi viaj deziroj ankoraŭ estas permesataj, tiam vi havas la rajton peti konsilon de via Dio kaj la amrondo. ¹⁰Kvankam tiujn konsilojn vi ne bezonas aŭskulti. Por komenci la ĉasadon, vi devas montri vian intencon al la ĉasoto materiale. ¹¹Vi lasos sur loko ofte vizitata de li personan objekton kaj ŝelon. ¹²Tio montras al li viajn intencojn, kaj donas al li la povon pripensi pri lia respondo. ¹³Se li deziras esti ĉasata, tiam li devas lasi du ŝelojn sur la loko, kie la unua troviĝis. ¹⁴Tio montras al vi, ke la ĉasato deziras iri renkonte al vi. ¹⁵En via unua renkonto, vi ambaŭ prezentos viajn kredojn kaj dezirojn. ¹⁶Por eltrovi ĉu vi kapablas pasigi la vivon feliĉe kaj pace, sed tute malpermesas al vi tuŝi unu la

alian. ¹⁷La ĉasato havas la rajton postuli, ke tiu renkonto okazu multajn fojojn, antaŭ ol vi povas progresi. ¹⁸La dua renkonto estas tre sankta, dum ĝi la ĉasato kaj vi unuiĝos haŭte, por elserĉi la plezurojn de unu la alia. ¹⁹La ĉasato denove havas la rajton postuli, ke tiu renkonto okazu denove, sed nur tri fojojn. ²⁰Se vi ambaŭ ankoraŭ deziras unu la alian, tiam vi devas prezenti tiujn dezirojn al viaj alspiritparolitoj, kiuj kunigos la gepatrojn por komenci la unuhaŭtiĝan interparolon. ²¹Se ambaŭ gepatroj konsentas, tiam vi devas kunloĝi dum pli ol ses lunoj por elprovi la manierojn de unu la alia. ²²Se post tiom da tempo vi ankoraŭ deziras unu la alian, tiam permesas al vi unuhaŭtiĝi”

Thursday 4th of May

¹Hodiaŭ mi havas malmulton priskribi, mi simple plenigis la tagajn aferojn. ²Tiam nokte mi renkontis Sinjoro Davison, kun kiu mi sidis kaj trinkis glason da vino dum horo. ³Mi trovis lin tre afabla kaj parolema, kaj li certe scias sian komercon.

Friday 5th of May

Unwritten Entry.

Saturday 6th – Sunday 7th of May

¹La paĝoj pri edziĝo estas la plej malsimplaj partoj en la tuta libro. ²La Sibiano havis bone difinitan manieron por tiaj situacioj, iel pli bona sed ankaŭ malbona en komparo kun niaj kutimoj. ³Mi fariĝis

laca leginte tiom multe pri edziĝo, ke mi decidis elserĉi ion pli interesan, ⁴kiam mi trovis la tridek kvinan paroladon de Carjata ⁵“Se du militludistoj disputas, kaj ne povas solvi siajn malfacilojn per interparolo, tiam permesas al ili partopreni en la Di-ago de fiero—⁶La du militludistoj kun dek du atestantoj iros renkonte al unu alia en publika loko, por batali kaj elverŝi siajn kolerojn sur unu la alian. ⁷Ili estas permesite uzi ĉiujn sendanĝerajn manierojn por venki unu la alian. ⁸Kaj la batalo nur ĉesas, kiam unu militludisto falas je la alia. ⁹Sed se la batalo ĉesas pro morto, tiam la Popola Paalo forpelos aŭ mortigos la alian militludiston. ¹⁰Se du homoj, kiuj ne estas militludistoj disputas, kaj ne povas solvi siajn malfacilojn per interparolo, ¹¹tiam permesas al ili aĉeti la servojn de du militludistoj, por batali kiel anstataŭuloj. ¹²Je la fino de la batalo, la aĉetanto de la falinta militludisto devos doni la ŝelojn de du militludistoj. ¹³La Di-ago de fiero ĉesigos ĉiujn disputojn inter la du personoj, sed se la disputo daŭros, tiam la Popola Paalo punos ambaŭ homojn”

Monday 8th of May

¹Oni dediĉis grandan parton de la libro al diversaj kreskaĵoj, kiujn mi ofte transsaltis pro enuo.

²Kvankam mi devas priskribi unu apartan kreskaĵon, kiu ŝajnis al la Sibiano tre grava.

³Precipe ĉar Orientlaŭduloj uzis ĝin por mortigi la alspiritparoliston Rotoŝo. ⁴Jen kion la Sibiano

diras pri ĝi “la norda tropo staras tiel alte kiel viro, kun ovformaj folioj, kaj ruĝbluaj floroj. ⁵Oni uzis ĝin kiel helpilon en diversaj situacioj, de nasko al mortigo” ⁶Ĉar tiu ĉi lando estas plena je malsimilaj kreskaĵoj, mi volas scii. Ĉu tiu kreskaĵo troviĝas en Aŭstralio?

Tuesday 9th – Wednesday 10th of May

¹Hodiaŭ pastro Lindzo ĉagrenis min pri mia manko ĉe la preĝejo, tiu viro ne scias ĉesi. ²Mi volis fari la Di-agon de fiero kontraŭ li... ³Post la tagmezo mi decidis legi la libron iom pli, tiam mi renkontis la jenan paroladon. ⁴Mi kredas, ke ĝi estas la plej terura parto el mia religio. ⁵Jen la naŭa parolado de Vajeso, kiun li donis je la fino de la silenta milito ⁶“La dioj komunikis al mi, ke ni estas permesite sklavigi nur tiujn, kiuj volas ataki nian genton. ⁷Sed ni devas prezenti al ili unue elekton – morton aŭ sklavigon. ⁸Se niaj kaptitoj elektas sklavigon, ili servos al ni cent kvardek kvar lunojn, sed se ili konvertas sin al nia religio, tiam ni tuj liberigu ilin. ⁹Tamen se ili konvertas sin nur por liberigi sin, tiam ni tuj publike mortigos ilin. ¹⁰Mi devas kvankam aldoni, ke malpermesas al vi uzi viajn sklavojn sekse. ¹¹Ĉar via celo estas instrui al ili pri la vereco de la Dioj, kaj konverti ilin laŭ la bona vojo”

Thursday 11th of May

¹Mi multe pensadas pri tio, kion mi legis hieraŭ.
²La ideo de sklavigo estas terura afero, ne nur pro

tio, ke mi estas Esperantisto. ³Sed ankaŭ, ke ĝi staras kontraŭ miaj propraj moraloj. ⁴Jes ja, mi neniam povus akcepti ĝin. ⁵Vere mi estas necerta pri kiel legi tiun paroladon. ⁶Ĝi pensigas min pri Nutaso, ĉu ŝi vere subtenas sklavigon de aliaj homoj? ⁷Mi supozas, ke mi devas kompreni la paroladon laŭ la tempo. ⁸Ekzemple, se estintulo rigardas homon en malliberejo de nia tempo, ĉu li nomus tiun homon sklavo? ⁹Ĉar krimuloj kaj mortigistoj en niaj malliberejoj devas labori. ¹⁰Do mi supozas, ke sklavigo estas formo de malliberejo, almenaŭ laŭ la Sibiano.

Friday 12th – Sunday 14th of May

¹Hodiaŭ vespere parolante al Lukeo pri miaj kredoj, mi levis la ideon de fantomoj. ²Sed aŭskultinte lian respondon, mi decidis ĉesi paroli. ³Tiam tralegante la libron, mi trovis paroladon pri fantomoj. ⁴Jen la tridek oka parolado de Ostuo ⁵"Antaŭ ses lunoj viro petis, ke mi vojaĝu al lia vilaĝo, kaj forpelu fantomon de tie, kiu nokte turmentadas lian familion. ⁶Mi konsentis, kaj vojaĝis norden kun li. ⁷Dum la unua nokto kiel lia gasto, mi renkontis la fonton de lia timo, ĉar fantomon li ja havis. ⁸La venontan matenon mi kunigis la vilaĝanojn, kaj paroladis la fonton de fantomoj. ⁹Mi diris, ke nur en kelkaj esceptaj okazoj, animoj povas ŝanĝiĝi al fantomoj. ¹⁰Ekzemple se animo ne povas trovi sian sanktan objekton, ĝi ne trovos sian vrilon, kaj tial ne eniros la Paalon de la Dioj. ¹¹Sed ne ĉiuj animoj estas

pretaj, kapablaj, aŭ eĉ havas la deziron por komenci la finan vojaĝon. ¹²Nature kelkaj timas pereon je la kolero de la Dioj pro agoj faritaj kontraŭ la postuloj. ¹³Mi demandis la vilaĝanojn, kie okazis la plej freŝa morto. ¹⁴Neniu respondis je mi, tial mi demandis al ili pli forte. ¹⁵Post certa tempo, junulino donis la plej teruran rakonton. ¹⁶Ŝi priparolis nekonaton, kiu mortis sur la vojo sen kaŭzo. ¹⁷Trovite, li estis tiritita al malproksima loko, kaj forgesita por la birdoj. ¹⁸Aŭdinte tiun teruran rakonton, mi tuj ordonis, ke ili irigu min al tiu loko. ¹⁹Mi volis plori pro tio, kion mi vidis. ²⁰La suno bruligis lian haŭton for, dum liajn partojn forportis rampaĵoj. ²¹Mi ordonis al ili, fosu truon unu homon profunda. ²²Ricevinte tiun ordonon, la subtenistoj komencis plendi pri la utileco de tio. ²³Mi multe koleras je ili, ĉu siajn erarojn ili ne vidas? ²⁴Mi tiam ordonis, ke po dek du vilaĝanoj de ĉiu Dio, surmetu benitan ŝelon sur la dek du korp partojojn de li. ²⁵Enteriginte lin, mi diris pli, ke malrespekto de mortinto povas venigi danĝerajn rezultatojn por la vivantoj. ²⁶Aparte se oni forĵetas korpon senzorge, ²⁷ĉar animo perdiĝinta inter nia ekzisto kaj la ekzisto de la Dioj suferas multan doloron. ²⁸Tial ni devas pli bone instrui al niaj junuloj la Di-agojn de nia kredo, ²⁹ĉar la sano de nia religio kuŝas en iliaj manoj.”

Monday 15th of May

¹Mi rimarkis, ke kelkaj magazenoj en la lastaj semajnoj komencis fermiĝi. ²La mona situacio tie

ĉi fariĝas tre malbona por multaj homoj. ³Eble ni povas lerni de la Sibiano, vere estas nenio interesa proksime.

Tuesday 16th of May

¹Hieraŭ mi denove songis pri tiu senhoma domo, kaj vidis tiujn flugantajn konstruaĵojn. ²Sed aldone mi aŭdis longan bruon, kiu similas je sonorilo de ŝipo. ³Mi ne povas eltrovi ĝian fonton, ĉar fakte ĝi venis de ĉie, kaj tuj post ĝi, la ĉielo blankiĝis kaj la tero ektemegis. ⁴Mi ne povas memori tion, kio poste okazis.

Wednesday 17th of May

¹En mia infaneco nenio ŝajnis pli grava ol amikeco, mi zorgis pri nur kiom da novaj amikoj mi povas gajni, ĉar ju pli da amikoj mi havis, des pli grava mi sentis. ²Sed nun kiam mi pensas pri tio, post multaj jaroj, kaj en malproksima lando sen amikoj. ³Ŝajnas al mi, ke amikeco estas afero portempa. ⁴Mi memoras mian plej bonan amikinon, kiun mi konis preskaŭ dudek jarojn, en la daŭro de unu jaro edziniĝis kaj naskis filon. ⁵Post tio, ni malproksimiĝadis de unu la alia, ĉar niaj vivoj apartiĝis laŭ malsimilaj vojoj. ⁶Tial la kredoj de la Sibiano plaĉas al mi, ĉar la paroladoj de ili klarigas kaj helpas al mi regi la vivon. ⁷Per ĝi, mi scias la tempon, kiam mi fariĝis plenaĝa, kiam mi devos edziĝi, kaj kion mi atendu post la morto. ⁸Ekzistas do neniam zorgoj pri, kion oni devas fari, ĉar ĉio jam estas skribita.

Thursday 18th – Saturday 20th of May

¹Oni dediĉis multajn paĝojn al la ideo de amo, tial mi nomis tiun ĉi parton de la libro amejo. ²Ankaŭ mi rimarkis, ke la ĉefparolanto en tiu ĉi loko estas Esuo, kies paroladoj komencis pli kaj pli plaĉi al mi. ³Jen unu el liaj paroladoj, la kvindek dua ⁴“Ekzistas nenia perfekta persono, kiu estas por vi, kaj vi por li, tia persono simple ne ekzistas. ⁵Tial ni devus elekti laŭ taŭgeco, ne perfekteco, ĉar perfektan personon vi ne trovos, sed taŭgajn personojn ni jam havas. ⁶Do kiam la tempo venas por unuhaŭtiĝi, la ĉasadon vi devas ĉesigi. ⁷Ĉar kiel la hundo kun la branĉo, kiu deziras la arbon, tiel vi deziros la pli belan. ⁸Tial se vi ne estas kontenta, vi ne estos feliĉa. ⁹Jen kial mi kreis la postulon de konado, antaŭ ol vi havas la permeson unuhaŭtiĝi. ¹⁰Elserĉu do iun, kiu povas satigi viajn haŭtajn dezirojn, povas ligi sin al vi spirite, kaj povas subteni vin en tiaj momentoj de devo. ¹¹Por tiuj el vi, kiuj ne povas imagi tian personon, pripensu vian hundon kaj lian amon por vi. ¹²Li eble ne estas la plej bela, aŭ forta hundo, sed li estas via, kaj vin li amas.”

Sunday 21st – Monday 22nd of May

¹Hodiaŭ mi daŭrigis serĉi por novaj paroladoj, kiam mi malkovris la jenan paroladon de Esuo. ²Tiu ĉi parolado strange ne rilatas al amo, sed al la disvastigado de la religio. ³Jen ĝi, la kvindek kvara parolado de Esuo ⁴“Alspiritparolisto demandis

min pri la postulo, ke ni instruu la veron de la Dioj al ĉiuj, kiuj estas pretaj aŭdi ĝin. ⁵Tio signifas laŭ mi, ke ni super ĉio devas fidele teni niajn kredojn, kaj plenigi la postulojn, ĉar kial oni kredus al ni, kaj deziri la verecon de Dioj, se ni ne kredus al tio? ⁶Do estu forta kaj feliĉa, sed nek laŭta nek silenta, ĉar la Dioj ĉiam bezonas pli da kredantoj. ⁷Do se vi deziras disvastigi la veran religion, tiam ĝin prezentu al viaj aŭskultantoj en konvena maniero, celante la bezonojn de ili, ⁸ĉar nia religio kovras ĉiujn flankojn de la vivo, kaj povas doni feliĉon al la plej malfeliĉa. ⁹Rakontu al ili pri la Dioj, Prezentu la postulojn, kaj parolu la paroladojn de niaj plej saĝaj alspiritparolitoj. ¹⁰Se vi estas certa, ke la religio plibonigos iliajn vivojn, tiam donu al ili la donacojn de nia religio, ¹¹ĉar ili neniam forgesos vian bonfaradon” ¹²Nun mi komprenas la saĝecon de Slatino, kaj kial li havigis al mi tiun ĉi libron.

Tuesday 23rd – Wednesday 24th of May

¹Jen la kvindek kvara parolado de Ostuo, kiu priparolas la danĝeron de la Orientlaŭduloj. ²Mi supozas, ke ili estas la priskribitaj homoj de la nordo ³“Ili okupas niajn landojn, prenas niajn fratinojn, kaj malpermesas nian sanktan religion. ⁴Mia koro alvokas la Diojn por justeco, ĉar mi memoras la tempon, kiam ni povis libere paŝi tra la vilaĝo de Seroto, ⁵kaj nun niaj plej kuraĝaj militludistoj ne povas eniri. ⁶Orientlaŭduloj, legantoj de la libraĉo atakadas la flankojn de nia

sankta lando. ⁷Kiel birdoj sur la dorso de besto mortanta, ili atakadas, tial mi ordonas en rekompenco, ke ni ataku antaŭ ol iliaj plumaj buŝoj kaj birdaj fingroj sufokas nin. ⁸Tial ataku por niaj infanoj, por nia religio, por nia estonteco. ⁹Kontraŭstaru la laŭdulojn de Sireo! Forpelu ilin de niaj landoj, kaj restarigu niajn sanktajn lernejojn. ¹⁰Ĉar silenteco kondukos nin al morto.

Thursday 25th of May

¹Mi trovis paroladon de Carjata, kiu estas tiel simila je miaj propraj kredoj, ke mi ne povas imagi pli bonan paroladon. ²Jen la tridek kvara parolado "Mi pasigis tri jarojn en instruado pri la vereco de la dioj. ³La plej granda malfacilo, kiun mi renkontis instruante novajn konvertantojn pri la paroladoj de Vajeso, ⁴estas ke nia lingvo estas tro malfacile ellerni. ⁵Jen kial mi rekomendas al la Paalo antaŭ mi, ke ni trovu aŭ kreu pli facilan kaj miksitan lingvon, por ke homoj el ĉiuj fontoj povas egale lerni niajn sanktajn kredojn" ⁶Eble mi povas krei novan lingvon, kiu uzos Esperanton kaj la kontombilajn nomojn.

Friday 26th – Saturday 27th of May

Unwritten Entry.

Sunday 28th – Monday 29th of May

¹Se mi montrus al pastro la jenan paroladon, li tuj suferus koratakon. ²Jen la kvindek tria parolado de Esuo ³"Malpermesas al vi plenigi la Di-agon de

ĉasado, se vi ankoraŭ estas virga. ⁴Ĉar tiu ĉi Di-ago postulas, ke vi konu la haŭton de via amato, antaŭ ol vi estas permesite unuhaŭtiĝi. ⁵Ĉar la plezuroj de la haŭto estas la sola ĝojiga doloro, kiun la Dioj donacis al ni, ⁶tial estas granda krimo, rifuzi tiujn plezurojn. ⁷Do estu sciata al ĉiuj, ke inter la aĝo de matureco ĝis tricent lunoj, ĉiu viro kaj virino devas koni ne malpli ol tri aliaj homoj”

Tuesday 30th of May

¹La venontan dimanĉon mi intencas komenci la Di-agon de ĉasado kontraŭ Mariano. ²Do hodiaŭ mi elserĉis lokon, kie rozaj floroj kreskas, ĉar mi aŭdis, ke ŝi amas la rozan koloron.

Wednesday 31st of May

¹Kiu estus kredinta, ke trovi rozajn florojn estus tiel malfacile? ²Mi jam trovis blankajn, ruĝajn, flavajn, kaj multajn aliajn, sed rozaj floroj estas ankoraŭ netroveblaj. ³Tamen mi pensas, ke mi ne komencos la Di-agon de ĉasado kontraŭ ŝi, ĉar mi ankoraŭ ne posedas domon. ⁴Iom post la vespermanĝo, mi komencis lerni pri la diferencoj inter la angla kaj amerika leĝoj. ⁵Mi rimarkis, ke la diferencoj estas tiel multnombraj, ke mi ne havas la kapablon kalkuli ilin. ⁶Do mi supozas, ke la tempo venas por trovi novan laboron, sed ne gravas, ĉar vere mi neniam volis esti advokato.

June

Thursday 1st of June

Unwritten Entry.

Friday 2nd of June

¹Antaŭ du noktoj la Kontombiloj vizitis min denove, kaj donis la plej teruran ordonon. ²Ili diris, ke mia sorto estas morti en malpli ol ses monatoj ³ĉar la Dioj elektis min kiel ilian atestanton, kaj tre baldaŭ metos siajn sciojn dolore en mian kapon. ⁴Mi devas surpaperigi tiujn ordonojn por esti atesto pri la vereco de la Dioj. ⁵Ili diris, ke homoj de ĉie legos mian taglibron, kaj tra ĝi lernos pri la vereco de la Dioj. ⁶Tiam la Kontombiloj diris, ke kontraŭstari la Diojn estas neeble, kaj se mi malobeus ilin, tiam la animo revenos al detruo en la Paalo de la Dioj. ⁷Tamen se mi plenigus la ordonon plaĉe, tiam mi trovos feliĉecon en la venonta vivo. ⁸Kiajn mensogojn ili parolas. Mi tute ne kredas al ili. ⁹Mi simple songĝis, ĉar vere, mi ne povas esti certa pri tio, kion mi vidis. ¹⁰Mi estas tre sana, kiajn mensogojn, mi estas sanega.

Saturday 3rd of June

Unwritten Entry.

Sunday 4th of June

¹Mi estis en la banejo purigante vestaĵojn, kiam mi ĵuras, ke mi sentis iun fantoman paroli apud mi. ²Sed turninte al tie, kie ĝi venis, mi vidis nenion. ³Tiam el nenie granda doloro min batis kaj faligis. ⁴Post mallonga tempo, mi vekigis sur la planko. Eĉ nun mi ne estas certa pri kio okazis al mi. ⁵Eble mi aŭdis la voĉon de Nutaso, sed tio estas neebla, ĉar kiam mi penis paroli al ŝi poste, neniu respondis je mi. ⁶Vere, ŝia silenteco kaŭzas al mi multe da maltrankvilo. ⁷Mi petadis ŝin, ke ŝi min gardu de la aliaj Dioj, sed ŝi daŭris resti silenta.

Monday 5th of June

¹Batis min ĉirkaŭ la vespermangŝo granda kapdoloro. ²Ankaŭ Lukeo rimarkis mian ŝanĝitan staton, kaj konstante demandis min pri kio okazis. ³Mi pensas, ke baldaŭ mi devos translokiĝi, ĉar ŝajne li ne povas lasi min pace. ⁴Ĉu li vere bezonas meti sian nazon en ĉiujn miajn aferojn? Ĉu vere?

Tuesday 6th – Wednesday 7th of June

¹Mi vekigis pro la apudesto de iu en la ĉambro. ²Mi povas aŭdi voĉon, kiu ekparolas en la orelojn, Dio mia, ĝi—³Estu sciata al vi ĉiuj, ke la Dioj bezonas super ĉio vian fidelecon. ⁴Sed ne konfuzu amon, timon aŭ preĝon kun fideleco, ĉar ni ne bezonas viajn amon, timon aŭ preĝon. ⁵Ni bezonas nur viajn konstantajn fidelecon, respekton, kaj plej grave vian progreson. ⁶Tial ni prezentis al vi ĉiuj la postulojn, por progresigi vin

laŭ la bona vojo, ĉar tion ni postulas. ⁷Se vi fiaske plenigos niajn postulojn, aŭ tute rifuzos nin, tiam ni forpelos vian senutilan animon je la tago de kalkulado. ⁸Do estu sciate, ke ni rigardas viajn legantajn okulojn. ⁹Jes Vi, leganto, la jenon ni havas por vi; Antaŭ ol vi fermas tiun ĉi libron, aŭ ridas laŭte, pensu zorgeme, ĉar post nun, ni juĝos vin laŭ niaj reguloj—¹⁰Dio mia, la voĉoj fine ĉesis. Kio okazis al mi, ambaŭ miaj brakoj tremegas kaj la frunto multe ŝvitas. ¹¹Mi legas tion, kion mi estis skribinta. ¹²Ĉu mi ja skribis tion? La kapo multe doloras min.

Thursday 8th of June

¹Hodiaŭ matene la voĉoj denove eniris la orelojn, kaj ripetis du horojn, ĝis mi fine skribis, kion ili diris ²“Estu sciate al ĉiuj, ke ĉiu vorto el la buŝoj de la Alspiritparolitoj Vajeso, Carjata, Ostuo, kaj la Scimanĝisto Esuo spegulas niajn sanktajn ordonojn. ³Tial vi devas respekti iliajn paroladojn kiel niajn proprajn, ⁴esceptinte se la paroladoj donitaj kontraŭstaras niajn postulojn, ĉar eĉ tiuj sanktuloj povas paroli erarojn”

Friday 9th of June

¹La tutan tagon mi sentis min malsana, sed la voĉoj ne lasis min sola ĝis mi skribis tion, kion ili diris. ²Tamen eĉ tiam la voĉoj ne ĉesis, ĝis mi eltrovis kaj korektis eraron en mia transskribaĵo ³“Estu sciate al ĉiuj militludistoj, ke ili devas ellerni la glavon, ĉar ju pli bone ili regas la glavon, des pli

bone ili regos siajn forton, rapidecon, precizecon, kuraĝon, kaj timon. ⁴Vere, ni la Dioj ne zorgas pri tiuj militludistoj, kiuj kapablas levi la plej grandajn pezajon, kuri la plej longe, aŭ drinki la plej multe, ⁵ni honoras tiujn militludistojn, kiuj kapablas regi la glavon”

Saturday 10th of June

¹Hodiaŭ matene mi preĝis al Nutaso, ke ŝi liberigu min de la diaj planoj. ²Sed ŝi ne respondis je miaj petoj, kaj poste la voĉoj komenciĝis denove. ³Mi sentas, ke la jena parolado estis por mi ⁴“Timi la morton estas timi la nokton, ĉar tiel certe kiel la suno releviĝos, la kredantoj renaskiĝos, ⁵ĉar la tempo kaj loko de via morto estis jam decidita, antaŭ ol vi eĉ naskiĝis. ⁶La sola afero kiun vi povas elekti, estas pasigi la vivon laŭ niaj postuloj kaj skribi nian ateston. ⁷Sed ne tentu nin per agoj malbonaj, ĉar eĉ ni povas fariĝi malpaciencaj, kaj do detranĉi vian vrilon.” ⁸La Dioj preparolas detranĉi la vrilon! Ja detranĉante ĝin!

Sunday 11th – Monday 12th of June

¹Estu sciate al ĉiuj, ke ekzistas tri sanktaj punoj, forpelo, morto de la korpo, kaj morto de la animo. ²Se la Popola Paalo forpelas vin, tiam vi estos elĵetita de via vilaĝo, kaj devas vojaĝi al loko malplena je kredantoj. ³Tie vi havos du manierojn por elaĉeti vian honoron. ⁴Vi povas aŭ resti tie dum la cetero de via vivo, aŭ konverti la tutan vilaĝon al nia sankta religio. ⁵Nur se vi konvertas

ĉiujn nekredantojn, vi estos permesite reveni al via vilago. ⁶Se ĉiuj vilagoj jam estas plenaj je kredantoj, tiam vi devas loĝi sole la tutan vivon. ⁷Se la Popola Paalo punas vin al morto, tiam vi ricevos dek du lunojn por prezenti vian senkulpecon. ⁸Se vi montriĝas senkulpa, la Popola Paalo liberigos vin tuj, tamen se vi malsukcese montras vian nekulpecon, tiam la Popola Paalo publike mortigos vin. ⁹Se la Popola Paalo punos vin al morto de la korpo kaj la animo, vi denove ricevos dek du lunojn por montri vian senkulpecon. ¹⁰Post tiom da tempo, la Popola Paalo mortigos vin, kaj kiam la animo revenas al la Paalo de la Dioj. ¹¹Ni, la Dioj eternigos vian memoron, kaj metos vian animon en la korpojn de mil rampaĵoj por ke vi travivu mil vivojn plenajn je malfeliĉeco, poste ni pereigos vian animon. ¹²Se la Popola Paalo mortigos vin sen la eblo prezenti vian senkulpecon, ¹³tiam la Dioj gardos vian animon, kaj pereigos la animon de viaj mortigintoj"

Tuesday 13th of June

¹Dum la tuta tago la kapo doloras min. ²Vere mi estas necerta, kiom longe mi povas travivi tiel. ³Mia vivo jam fariĝis difektita.

Wednesday 14th – Thursday 15th of June

¹La voĉoj komencas paroli "Estu sciate al ĉiuj, ke la plej bona maniero por fortigi nian religion estas per viaj infanoj. ²Tial via koro fortiĝos,

disciplinante viajn infanojn, ĉar ju pli ili regas super vi, des pli ili malrespektos vin. ³Do se viaj infanoj ne plenigos viajn ordonojn, vi faros la jenan. ⁴Unue vi timigos ilin per vortoj. ⁵Due vi forprenos iliajn privilegiojn. ⁶Trie vi timigos ilin per la bastono, kaj fine vi batos ilian postaĵon per la bastono. ⁷Tamen tute malpermesas al vi bati aliajn korpopartojn aŭ vundi. ⁸Via intenco estas instrui al ili la bonan vojon, ⁹tamen se vortaĉoj elbuŝiĝas, tiam vi tuj batos ilian postaĵon per la bastono, ĉar malpuraj vortoj venas de Sireo. ¹⁰Kvankam vi estu zorgema, ĉar ofta batado kondukas al malamo”

Friday 16th of June

¹“Estu sciate al ĉiuj, ke vi ĉiuj devas restarigi la Popolan kaj Regantan Paalojn, ²ĉar sen tiuj korpoj la Sibiano restos eterne rompita kaj senprogresita. ³Ankaŭ vi ĉiuj starigos la Sanktan Paalon de Generacioj, kiu estos la surtera trono de la Dioj. ⁴Ĉiu Sibiano portos kun si taglibron, kiun li sendos al la Sankta Paalo de Generacioj po dek du lunoj, ⁵por esti memoraĵo de li, por resti eterne kun ni. ⁶Nur la plej sanktaj alspiritparolistoj, la posedantoj de la sankta taglibro estos permesite moviĝi en la Sankta Paalo de Generacioj, ⁷sed iu ajn kredanto havas la rajton peti scion de homoj mortintaj.”

Saturday 17th of June

¹La Dioj ordonis al mi, ke mi foriru Saleon, kaj marŝu nordokcidenten ĝis novaj ordonoj venos al

mi. ²Ĉar laŭ ili la urba vivo prenas tro multe da mia tempo, tial mi devas translokiĝi al la montoj malproksimaj. ³Ili ne diris al mi, kiel mi travivos tie. ⁴Do mi supozas, ke mi devas kredi al ilia boneco. ⁵Mi esperas, ke la morto ne estos tro dolora aŭ pro malsato.

Sunday 18th of June

¹La suno ekleviĝas. Mi devas trovi pli bonan lokon por ripozi, ²ĉar mi jam marŝis preskaŭ ok horojn, kaj nun estas tre laca.

Monday 19th of June

¹Mi marŝis la tutan tagon. Eltrinkante el rivereto, mi vidis la plej strangan aferon. ²Kangaruo mortis rekte antaŭ mi, mi estis staranta tie, pensante pri kiel malsata mi estis, kiam subite branĉo falis sur ĝin desupre. ³Nun mi sidas en malseka kavo apud rivero, bruligante la viandon de la kangaruo, kiu estas tre malfacile kuiru. ⁴La voĉoj rekomenciĝas “Vi restos tie ĉi, kaj tie ĉi vi surpaperigos nian scion ĝis la fino”

Tuesday 20th – Wednesday 21st of June

¹Mi vekiĝis apenaŭ antaŭ la sunleviĝo pro la laŭta frapado de pluvo kontraŭ ŝtonon. ²Tiam mi trovis ĉe la buŝo de la kavo folion kun fiŝaĵo kaj nuksoj. ³Mi ne konis tiajn nuksojn, sed mi estis tiel malsata, ke mi manĝis ilin senzorge. ⁴Eble la Dioj decidis provizi nutron por mi. La voĉoj komenciĝis iom post tagmezo, en tiu momento mi

estis for de la taglibro. ⁵Do mi skribis ilian voĉon sur kajeron, kaj nun devas transskribi ĝin al tie ĉi ⁶“En vivo ekzistas naŭ periodoj, la homaro estas je la tria periodo de sia disvolvo. ⁷La unua periodo estis plenigita, kiam la malgravaj Dioj semis la stelejaron per nova vivo. ⁸La dua periodo estis plenigita kiam la homaro fariĝis la plej supera kaj kapabla besto de lia mondo. ⁹La tria periodo ankoraŭ ne estas plenigita. ¹⁰Vi la homaro devas eniri la stelejaron kaj malkovri ĝiajn sekretojn. ¹¹La kvara periodo komenciĝos nur kiam la homaro unufojon renkontos la aliajn bestojn de tiu ĉi stelejaro. ¹²Tiam granda milito komenciĝos, el kiu kelkaj bestoj levos sin al malgravaj Dioj. ¹³Sed la homaro devos travivi militon kaj pacon antaŭ ol ili atingos Diecon. ¹⁴La fina celo de ĉiuj bestoj estu fariĝi Dioj, kaj tial travivi la renovigadon”

Thursday 22nd of June

¹Hieraŭ nokte mi sonĝis pri du grandaj ŝipoj vojaĝantaj en la nigra ĉielo, ambaŭ estis senfumaj kaj senvelaj, kaj ambaŭ portas la numeron dek du sur si, ²sed la numero sur la plej granda estis renversita. ³Kiam la du ŝipoj pasas unu la alian, pafilegoj vidiĝis de interne, kaj komencis trapafi unu la alian. ⁴Post ŝajne kelkaj sekundoj, unu ŝipo sensone eksplodis. ⁵En tiu momento mi vekiĝis al fiŝaĵo kaj fruktoj ĉe la envenejo. ⁶Nekonato sendube prizorgas min. Mi ne scias, kial li helpas al mi, sed mi deziras danki lin. ⁷Ankaŭ ŝajnas ke la

Dioj volas doni al mi unu liberan tagon, ĉar mia ventro sentas pli bone.

Friday 23rd – Saturday 24th of June

¹Se mi ne alportis mian taglibron, mi jam estus la tagon forgesinta. ²Dum la lasta semajno mi multe maldikiĝis, ĉu pro la malsano, ĉu mia ŝanĝinta manĝkutimo, mi ne scias. ³Kaj mi komencis dubi ĉion, kion mi sentis, vidis, kaj aŭdis. ⁴Ĉu mi simple imagis ĉion, la Kontombilon, kaj ĉion alian? Ĉu eĉ la negro ekzistis? Ĉu ankaŭ lin mi imagis? Kio okazas al mi? ⁵“Longe post via morto, viro ne de via sango sed de via animo heredos vian taglibron. ⁶Li donos ĝin al la leganta mondo. Unue oni atakos niajn novajn kredantojn publike, sed baldaŭ niaj kredantoj estos forgesitaj. ⁷Tamen en la jaroj poste, granda milito kaptos la mondon, kondukate de la Orientlaŭduloj, kiuj uzos trompojn kaj mensogojn por gajni superecon. ⁸Ili prenos la korojn de viaj ankoraŭ ne naskitaj infanoj, kaj forturnos ilin kontraŭ vi. ⁹Estos dum tiu tempo, ke la homaro revenos al la verecon de la Dioj, kaj alvokos nin por helpo. ¹⁰Kaj kiam ĉio ŝajnas perdita, nova generacio de militludistoj, scimanĝistoj, subtenistoj, kaj alspiritparolistoj staros kaj batalos kontraŭ la Orientlaŭduloj. ¹¹Tamen la malbenaĵo neniam forlasos la homaron, ĉar la scio de ĝi travivos eterne, kaj revenos multajn fojojn por batali kontraŭ vi.

Sunday 25th of June

¹Estu sciante al ĉiuj, ke viaj infanoj havas la rajton libere kaj sentime demandi la Diojn, pri io ajn antaŭ ol la aĝo de matureco. ²Ĉar ili estas junaj kaj ankoraŭ ne promesas sian animon al iu aparta Dio. ³Tamen post la Di-ago de matureco, ili devas elekti Dion kaj promesi sin al li.

Monday 26th – Tuesday 27th of June

¹Vekis min iu tre frue matene ĉe la buŝo de la kavo, almenaŭ mi kredas, ke ĝi estis homo. ²Ĉar denove mi trovis fiŝaĵojn kaj fruktojn ĉe la envenejo. ³La voĉoj komencis paroli ⁴“Jen postulo, kiun vi devas plenigi, se vi laŭdas la postulojn publike, malobservante ilin private, tiam ni la Dioj suferigos vian animon. ⁵Vi ellernu la sanktan lingvon, la lingvon de tiu ĉi libro, ĉar ĝin ni elektis kiel la lingvon de la homaro. ⁶La tuta cetera lingvaro vi donos al historio, ĉar ili ne taŭgas por la vojo postironta”

Wednesday 28th of June

¹La perfekta militludisto nek bezonas esti monto, sed nek povas esti ŝtoneto, ĉar li estas gardanto kaj atakanto de la gento. ²Li devas posedi la kuraĝon akcepti, ke lia vivo servos al la gento, kaj se bezonate, li oferos ĝin feliĉe. ³Li ĉiam kondukos sin honore, spegulante la postulojn de la Dio tra ĉiuj siaj agoj” ⁴Mi elĵetis la enhavaĵon de mia stomako la tutan matenon, kaj vidis, ke miaj haroj komencis apartiĝi de la kapo. ⁵La malsano, kiu

atakadas mian korpon, progresas tiel rapide, ke mi ne povas diri, kiom longe mi havas.

Thursday 29th of June

¹“Estu sciante al ĉiuj, ke vi estas malpermesite trompi aliajn, esceptinte se via trompo estas farata laŭ la jenaj reguloj. ²Vi trompas nur el timo de doloro aŭ morto, aŭ por ĉesigi batalon inter du homoj. ³Tamen trompado estas danĝera afero, ĉar multaj trompoj kondukos al pezaj memoroj” ⁴Mi fine eltrovis tiun, kiu lasis la manĝojn ĉe la envenejo de mia kavo—estis negro. ⁵Mi penis paroli al li, sed li ne komprenis miajn vortojn kaj vidinte min, li tuj foriris. ⁶Poste dum la tago, mi komencis elĵeti el la buŝo multe da sango, kaj la manoj komencis perdi siajn harojn.

Friday 30th of June

Unwritten Entry.

July

Saturday 1st - Sunday 2nd of July

¹La tutan matenon mi elĵetis la enhavaĵon de mia stomako. La voĉoj parolis denove, mi baldaŭ devas foriri ²“Vi mortos post tri tagoj, ĉar la mastro de la stelejaro en lia kolero ordonis al ni, ke ni mortigu vin, per apartiĝo de via korpo. ³Por ni rompis lian sanktan regulon, enirinte en vian ekziston kaj doninte nian scion. ⁴Sed ĉio estos bona, ĉar li estas malfeliĉa, sed ne enua, kaj la plejmulto de nia scio jam atingis viajn paĝojn. ⁵Do ni sendis al vi Sireon, por kontraŭstari nian apartiĝon, ĉar la reguloj de nia ekzisto ne superregas lin. ⁶Sed lia potenco kapablas gardi vin dum nur tri tagoj. ⁷Do rapidu al Saleo, metu vian taglibron en facile troveblan lokon, kaj ni sendos alian por repreni ĝin. ⁸Ne timu vian morton, ĉar nia vorto estas justa, kaj vivon plezuron vi havos”

Monday 3rd of July

¹Mi sentas kiel mian haŭton pendas senforte de la ostoj, kiel nur mia volo tenadas ĝin. ²Tamen mi devas diri, antaŭ ol mi spiros la finan spiron, kaj iros for al la granda Paalo, ³ke kvankam tiu ĉi libro ne plaĉos al viaj oreloj, kaj eble hontigos viajn sentojn. ⁴Vi devas memori, ke la Dioj ne servas al vi, sed vi servas al ili, kaj kiam la utileco de via vivo fariĝas ne pli, tiam vi pereos kiel mi. ⁵Eĉ skribante tiujn ĉi malfortajn vortojn, mi povas

senti miajn ostojn rompi, haŭton ŝiri, kaj harojn defali. ĜMi nur esperas, ke neniu alia bezonos travivi tiun ĉi suferon. Nun devas mi kanti la lastan kanton.

END OF DIARY

Biography

Richard Delamore was born in Emerald Queensland in 1987, however spent most of his childhood on the move from town to town. He completed his territory education in Burnie Tasmania, before joining the Australian Army full time as a Signals Operator Support Systems. Esperanto, the language of the original diary contained within this book, was first introduced to him through an old brochure about international languages of history. It was claimed within this text that anyone of reasonable intelligence could master Esperanto in a few months study due to its simple design and logical elegance. He accepted the challenge without thinking, starting a journey that has changed his life since. To date Richard has served as a board member for the Australian Esperanto Association and a committee member of the Sydney Language Festival. He has provided expert opinions regarding the language for a yet to be released web-series, and been interviewed for a nationally televised documentary regarding Esperanto.